

1982 oktobro

75-a jaro

n-ro 922 (10)

aperas monate (escepte de aŭgusto)

esperanto

ISSN 0014-0635

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun unesko)
nieuwe binnenweg 176 — 3015 bj rotterdam — nederlando



Masmoudi multflanke samopinias kun ni

Vi trovos

plurajn tekstojn en ĉi tiu numero, kiuj ligiĝas al Japanio. Kial? Ĉar la redaktoro iris lastatempe tien kaj komencas ekkompreni la japanojn kaj la japanan Esperanto-movadon. Fakte, estas ja strange sidi de monato al monato en onia roterdama oficejo kaj provi kompreni kio okazas en la sud-amerika, ĉina, usona, hinda aŭ eĉ bulgara, franca aŭ sveda Esperanto-movado. Ne sufiĉas tiu unu ĉiujara ekskurso al la foireca atmosfero de la Universalaj Kongresoj por konvene orientiĝi en la tutmonda fluo de la Movado. Necesus pli multe moviĝi tra la Movado. Sed, vi scias, la buĝetoj ne eltenus tion. Tamen, ni eble provu ĉiujare ferii en alia lando. Tio interalie portus al la revuo novajn kunlaborantojn. Vi vidos en la venontaj numeroj, ke pluraj japanaj nomoj debutos sur niaj paĝoj. Cetere, ĉi tiu vortlavango apenaŭ lasas spacon por pardonpeti pro la malfrua livero de la numero. Kion diri? Ferioj elreligas la homojn dum iom da tempo. Ĉu tio ne okazas al vi kelkfoje? La malfruiĝo de la numero minacis, ke vi unue ricevu la ĉi-jaran Jarlibron, kaj nur poste la oktobran revuon. Tamen, la lasta bona novaĵo pri la Jarlibro estas, ke ĝi estas ĉe la bindejo kaj ĝi do definitive aperos meze de novembro. Baldaŭ poste (aŭ samtempe) sekvos la novembra kaj-tiel-pluaj revunumeroj. Intertempe, serĉu ion utilan aŭ amuzan en la dupaĝa titolamaso de "Laste aperis. . .". Ĉu pluvas ĉe vi?

Enhavo

- 161 Postvojaĝaj notoj: Japanio — de revo al ravo (S. Milojević)
Elekto de komitatanoj B
- 162 Novaj Honoraj Membroj: Azzi, Bormann, Rossetti
- 163 Nova laborplano pretiĝas: Kiel plani la estontecon? (Werner Bormann)
- 165 Eksteraj rilatoj: Du vienaj konferencoj; Reagoj: Malproblememo (Emilija Lapenna)
- 166 Belartaj Konkursoj 1983: Premioj atendas gajnontojn; Monda Ĵamboreo en Kanado: Dudek kvin premioj po 200 kanadaj dolaroj (Ronald)
- 167 Tokia seminario: Pri internacilingvaj studoj (Yosimi Umeda)
- 168 Kunlaboro korea-japana: Gejunuloj donas ekzemplon
- 169 Por gepatroj: Atento al la denaskaj lingvouzantoj (Ernö Csiszár)
- 170 Universala Esperanto-Asocio: Buĝeto por 1983
- 171 Recenzoj: "Kiu estas kiu en scienco kaj tekniko 1981" de C. Darbellay (G. Sutton); "Divershumore" de R. de Jong (L.H. Knoedt); "Pretertempe" de A. de' Giorgi (P. Daşgupto); "La aventuroj de ŝpar- kaj alia porketoj" de Rik De Roover (K. Schubert); "Apologio" de Tertuliano (D.B. Gregor); "Komputado" kaj "Komputilo proksimiĝas al homo" (R. Vetter)
- 173 Laste aperis. . . (novaj eldonaĵoj en aŭ pri la Internacia Lingvo)
- 175 TEJO-paĝo: Seminario en Szentendre: Homaj loĝlokoj — hodiaŭ kaj morgaŭ (Norberto Saletti)
- 176 Nekrologoj (F. Egami, A. Holzhaus, H. Oka, Li Unsang, Ž. Takač)
Loke — Fake — Persone (mallongaj novaĵoj)
- 178 Oficiala informilo de la Centra Oficejo de Universala Esperanto-Asocio
- 179 Kotiztabelo de UEA por la jaro 1983
- 180 Anoncetoj

La kovrilo

La eminenta tuniziano Mustapha Masmoudi (meze de la foto) interparolas en la antverpena UK kun Barbara Despiney kaj Renato Corsetti. Kiel vi povas legi sur la paĝo 165, tuj post la antverpena Kongreso okazis en Vieno konferenco de Unuiĝintaj Nacioj, kaj la ambasadoro Masmoudi kontaktis tie la reprezentanton de UEA, H.M. Maitzen. Estas nun tute evidente, ke la tunizia diplomato grandparte samopiniis kun ni esperantistoj pri pluraj demandoj, kiuj rilatas la tutmondan komunikadon kaj la lingvo-problemon. Ĉu temas nur pri la klarvido de Masmoudi aŭ ni en la starpunktoj de tiu altrangulo povas flari ŝanĝon aŭ vojon al ŝanĝo de la miopeco en la aktuala mondpolitiko ĉi-kampa?

esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio, Nwe Binnenwg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Telefono: (010) 36 15 39.

Aperas monate (escepte de aŭgusto). Fondita en 1905 de M.P. Berthelot (1881-1910). Legata en 102 landoj. Redaktoro: Simo Milojević.

Abonprezo varias laŭlande. Petu de via landa asocio aŭ de la ĉi-supra adreso. Unuopa ekzemplero 4,— gld.

Anonctarifo (gld.): 1 p. 1000, 1/2 p. 530, 1/4 p. 290, 1/8 p. 170, 1/16 p. 110. Instancoj kaj entreprenoj de la Esperanto-movado rajtas rabaton de 50%. Eksterakovrilaj anoncoj kostas duoble. Ripetrabato 20%.

Banko: Bank Mees & Hope, Cool-singel 93, 3012 AE Rotterdam (konto n-ro 25.52.89.804).

Poŝta ĝirkonto: 37 89 64 (UEA).

Telegramadreso: ESPERANTO ROTTERDAM.

Estraro de UEA

Prezidanto kaj estrarano pri financo kaj administrado: s-ro Grégoire Maertens, Pr. Leopoldstr. 51, B-8310 Brugge, Belgio; tel. (050) 35 49 35.

Vicprezidanto kaj estrarano pri planado kaj landa kaj regiona agado: d-ro Renato Corsetti, via Collazia 21, I-00183 Roma, Italio.

Vicprezidanto kaj estrarano pri kulturo kaj edukado: s-ro Baldur Ragnarsson, Sogavegur 170, IS-108 Reykjavik, Islando; tel. (91) 3 73 01.

Ĝenerala sekretario: d-rino Flóra Szabó-Felső, Zója u. 5/b VII, 22., H-7624 Pécs, Hungario; tel. (72) 23-274.

Estrarano pri informado kaj delegita reto: s-ino Ursula Grattapaglia, Fazenda Escola "Bona Espero", BR- 77260 Alto Paraíso (GO), Brazilo; tel. (061) 226 8101 (en Brasília).

Estrarano pri kongresoj kaj virina agado: s-ino Eliza Kehlet, Heideweg 20, B-2120 Schoten, Belgio; tel. (03) 651 46 36.

Estrarano pri faka agado: s-ro Petâr Todorov, ul. Veĵen 2, ap. 10, BG-1421 Sofia, Bulgario; tel. 65 52 43.

Estrarano pri esploroj kaj eksteraj rilatoj: prof. Humphrey Tonkin, Stouffer College House, 3700 Spruce Street, Philadelphia, PA 19104, Usono; tel. (215) 387 8288.

Japanio — de revo al ravo

MI ĈIAM MIRIS ĝis kia grado la angloj bagateligas manpremon. Vi renkontas unu el ili, amikan delonge, kaj post tiom da jaroj gajnas nur salutan vorton ĉe la revido. Kvazaŭ la manpremoj ne estus pli elokventaj ol la trivitaj vortoj. Kvazaŭ mantuŝo ne havus tiun unikan komunikan valoron, kiel la rigardo aŭ la voĉo. Kun landoj devus esti simile kiel kun la homoj. Oni povas legi tutan monton da volumoj kaj vidi kilometrojn da filmoj, sen havi tiun kondensitan mesaĝon, kiun liveras la unua paŝo en tiu lando, la flaro de ĝia aero.

Post jardekoj da invitoj kaj promesoj, pro la ĝena foresto de tiu sublima informo, kiun liveras persona sperto, fine de aŭgusto kaj komence de septembro, mi iris tuŝi Japanion. Ruze, kiel aludis la enkonduko al la pasinta revunumero, mi ne disanoncis la vojaĝon al la japanaj movadanoj. Mi emis ripozi de la movado, fuĝi iom. Sed kiam mi bildkartis al kelkdeko da amikoj tra la mondo, estis tie pli da movadaj ol da neesperantistaj adresoj. Mi memoris junaĝan poeton, kiu versis proksimume jene: *Fuĝo ne eblas plu. / La vivo fermis la cirklon. / Eĉ branĉo se nun mi iĝus, ekpensus foliaro mia. . .* Kaj en mia kazo la folioj sendube estus eĉ "verdaj".

Kun deko da lingvoj, kiujn mi balbutas, sen Esperanto mi havis ĉiujn ŝancojn senti min komplete analfabeta en Japanio. Tion oni en Eŭropo apenaŭ povas sperti. Se mi ne estus esperantisto, mi lernus la lingvon post ĉi tiu vojaĝo. Kaj pri la angla, se vi demandas, ĉiuj japanoj lernas ĝin. Tamen, en la plurnivela subtera stacidomo de Sinzyuku neniu parolas ĝin. Mi perdis tie duonan horon por trafi la ĝustajn koridorojn, kajon,

direkton kaj vagonaron, kiu portu min al Nisi Nippori en Tokio.

Montriĝis tamen tute lerte elektitaj vojaĝantoj al Japanio en la tempo kiam tiun landon invadis ankaŭ: d-rino Flóra Szabó-Felső kaj d-ro Pál Felső, prof. Helmar Frank, d-roj Probal Daŝgupto kaj F. Lo Jacomo, por eĉ ne paroli pri trimembra ĉina delegacio kun Laŭlum ĉekape, tuta taĉmento da koreanoj kaj brigado da bo-parencoj aŭ aliaj ne-japanoj, kiel d-ro Ulrich Lins, s-roj Pompilio, Zeilinger, Schmid, Rowe, D. MacGill, Blatt k.a.

Kiam oni nur menciis eblecon prelegi ie pri movada temo, mi povis facile demandi, kial mi, al kiu pli ol sufiĉas la senĉesa movadado. Kial ne Daŝgupto aŭ Lo Jacomo, kiuj denaske estas parolemaj? Se nepre necesi paroli nome de UEA, mi atentigis, ke ni en la Asocio dividis la taskojn: la ĝenerala sekretario parolas, kaj la redaktoro skribas. Tiel okazis, ke d-rino Szabó-Felső devis prelegi en deko da urboj, kiujn ŝi vizitis.

Elektio de Komitatanoj B

EN 1983 okazos nova elekto de ĉiuj komitatanoj. Laŭ la Statuto akceptita en 1980, rajtas elekti la komitatanojn "B" ĉiuj individuaj membroj de UEA. La nombro de komitatanoj "B" ĉi-foje elekteblaj fare de la individuaj membroj estas: **sep** (konforme al la par. 24 de la Statuto).

Laŭ la reguloj, po dek individuaj membroj el almenaŭ tri diversaj landoj rajtas proponi nur unu kandidaton el inter la individuaj membroj de la Asocio. Al la proponoj, subskribitaj de la proponintoj, devas esti aldonitaj, krom la skriba konsento de la kandidato, ankaŭ biografieto kaj deklaro pri la movadaj celoj de la kandidato, kiuj kune ampleksu maksimume 150 vortojn. Kandidatigoj, kompletaj laŭ la ĉi-supraj preskriboj, devas atingi la Centran Oficejon en Rotterdam **antaŭ la 31a de marto 1983.**

Se la nombro de validaj kandidatoj ne estos pli ol sep, ili ĉiuj estos konsiderataj kiel elektitaj. Se la kandidatoj estos pli multaj, voĉdonilo estos sendita al ĉiu individua membro en majo.

La Statuto cetere difinas, ke komitatano devas esti individua membro de UEA dum la du jaroj antaŭ la elekto kaj resti individua membro tra la tuta oficperiodo. Ĉiuj komitatanoj estas reelekteblaj. Salajrata oficisto de UEA ne rajtas esti komitatano.



D-rino Flóra Szabó-Felső, ĝenerala sekretario de UEA, parolas en la Oomoto-centro en Kameoka.

Mi zumis tra la dekmilionhoma Tokio kaj gapis al ĝia pureco. Kiam mi zumis kun Izumi (Yukio), mi diris, ke mi intencas nomi lian landon "Pantoflujo", ĉar 117 milionoj da japanoj sukcesas bezoni duonan miliardon da pantofloj. Mi povus nomi la landon ankaŭ "Cindruj-ujo", ĉar je ĉiu dudeka metro en Tokio aŭ Kioto oni trovas surstratan cindrujon, tiel ke mi sentis min kulpa ĉiufoje kiam iom da cigareda cindro hazarde trafis la trotuaron. Cetere, ne estus novaĵo diri al vi, ke el teknologia vidpunkto Japanio ne estas la fora Oriento sed la ekstrema Okcidento. Neinteresitan pri la tekniko, min ravis la japanaj parkoj, precipe tiu en Kanazawa kun amaso da handikapitaj arboj. Detaloj nenie tiel ĉefrolas kiel en Japanio. Tial eble la plej ĝusta el miaj novaj nomoj por la lando estas "Detalujo". Sed vi atendas iom da movadaj novaĵoj, kaj ne ĉi tian malkoheran vojaĝnotaron. Jen do, havu ilin:

En Kamakura, proksime de Tokio, fine de aŭgusto okazis la 69a Kongreso de Japanaj Esperantistoj. Estis tie 320 japanoj kaj 24 eksterlandanoj el 9 landoj. Laŭ la kunvenabundo, tiu kongreso aspektis kiel eta UK. Ĉu vi scias, ke la japanoj havas siajn proprajn Belartajn Konkursojn? Mi vidis tie la teatraĵon *Frenez-eduko*, kies modernaj teksto kaj reĝisora arto superis la antverpenajn kongresajnprezentaĵojn. Ĉu vi aŭdis, ke en Japanio ekzistas konkurso por la plej bona loka bulteno en Esperanto? La libroservo tie elmontris plurajn titolojn, kiujn ni en la CO neniam vidis. En tiu kongreso kaj en tri miaj japanaj semajnoj eblis malmisterigi nur parteton de la sennombraj specifaĵoj de la japanaj lando kaj movado.

En Nagojo, mi kvazaŭ kursis al aktora trupo, kiu pretiĝas por venontjara partopreno en Pupteatra Internacia Festivalo en Zagrebo. Nun unu el iliaj brokantaj pupoj ekzamenas min de sur la librobreto en mia hejmo. En Kioto, tiu kvieta kaj imperiestra, Tacuo kaj Masumi Huĝimoto trababilis kun mi tagnokton. Ni iris al Ibaraki por saluti prof. Umesao en la Nacia Etnografia Muzeo, al kiu ni nun definitive vendis la librokolekton de la iama Universala Ekspozicio (3 027 libroj kontraŭ 25 000 guldenoj).

Lins kaj mi surprizis per dimanĉa vizito Ludovikiton kaj trovis lin laboranta super la presprovaĵoj de du novaj volumoj de "Plena verkaro de Zamenhof". En Osaka, plurajn horojn plenigis interesa konversacio kun Masao Miyamoto, legendo kaj motoro de la japana E-movado. Ankaŭ li kurbiĝas super la presprovaĵoj de sia nova japana-Esperanta vortarego. Gaku Konisi akceptis min en sia Minoo kaj poste aŭtis kun mi al Kameoka kaj Oomoto. Konisi, kiu beletras kaj muzikas, profesoras pri teoria fiziko. Ĉu tio ne sufiĉas por admiri kaj envii tiun nekutiman talentulon?

Oomoto, Krizantemo, Rondo Harmonia kaj ties 1500 membroj estas temoj, kiuj ne eniras ĉi tian skizan notaron. Al ili kaj al pluraj el la menciitaj temoj kaj homoj, ni devos reveni iam poste. Estos nun pli facile fari tion. Ni nun tuŝis Japanion. Ni vidis la Monton Fuji, veturis per la plej rapida trajno en la mondo, lernis uzi la manĝbastonetojn, kutimiĝis al sakeo, travidis la malperfektecon de multaj okcidentaĵoj, akiris novan amikokvanton kaj komencis kompreni Japanion.

S. Milojević

NOVAJ HONORAJ MEMBROJ:

Azzi, Bormann, Rossetti

KIEL ANONCITE en nia septembra numero, la Komitato de UEA dum la 67a UK en Antverpeno elektis tri novajn honorajn membrojn de la Asocio. Jen mallongaj biografioj de la tri honoritoj:

GIORDANO AZZI (Italio) naskiĝis en 1910, lernis Esperanton en 1927 kaj ekde tiam estis vicdelegito kaj delegito de UEA en Como. De post la Dua Mondmilito ĝis 1976 li estis estrarano de Itala Esperanto-Federacio, kiun li prezidis dum kvar jaroj. De 1954 ĝis 1964 Azzi membris en la Komitato, kaj de 1956 ĝis 1959 en la Estraro de UEA. Azzi organizis tri italajn kaj du internaciajn (de SAT kaj IKUE) E-kongresojn. De post 1935 li prezidas la lokan E-klubon en Como. Azzi tradukis la verkon *Poemoj* (1952) de G. Pascoli kaj publikigis nacilingvan tradukon de pluraj poeziaĵoj el *Esperanta antologio*.

ARTUR BORMANN (FR Germanio) naskiĝis en 1903 kaj Esperanton eklernis en 1945, por tuj ekaktivi en la lokaj grupoj de Bielefeld, Flensburg kaj Hamburgo. Inter 1949 kaj 1953 Bormann estis estrarano de Germana Esperanto-Asocio, al kiu li liveris plurajn nacilingvajn broŝurojn por la informado pri Esperanto.

Jam en 1956 Bormann verkis ampleksan libron pri interlingvistiko, sed ĝi ne aperis ĝis nun. Tamen, en 1958 aperis ampleksa artikolo pri tiu manuskripto en prestiĝa germanlingva faka revuo. La ĉefa kontribuo de Artur Bormann al la internacia E-movado estas lia periodaĵo *Interlingvistika informa servo*, kvaronjara periodaĵo, kiu regule aperadas de 1957 kaj antaŭ ne longe atingis sian centan numeron.

RETO ROSSETTI (Britio) naskiĝis en 1909. Li lernis Esperanton en 1928 kaj debutis kiel poeto du jarojn poste. Rossetti kunlaboris en *Literatura mondo* (2a kaj 3a periodoj) kaj en pluraj aliaj kulturaj revuoj. Li en 1949 iniciatis Belartajn Konkursojn de UEA, estis dum pluraj jaroj ties sekretario, kaj ankoraŭ estas membro de la juĝkomisiono. En *Kvaropo* (1952) aperis lia poemkolekto "Oazo"; sekvis la novelaro *El la maniko* (1955) kaj la poemaro *Pinta krajono* (1959). Rossetti kunredaktis la verkojn *Angla antologio* (1957) kaj *33 rakontoj*; *La Esperanta novelarto* (1964), kaj kuntradukis *Kantoj, poemoj kaj satiroj* (1977) de R. Burns. Aperis libroforme ankaŭ la tradukoj de Rossetti: *La tragedio de Otelo* (1960) de Ŝekspiro kaj *Piratoj de Penzanco* (1979) de W.S. Gilbert. En 1976 Rossetti publikigis la esejon *Spegulo de Esperantaj stiloj*. Li estas unu el la plej influaj kulturaj agantoj en Esperanto dum la lastaj kvindek jaroj.

Kiel plani la estontecon?

EĈ NOVA ESPERANTISTO tuj komprenas, ke la elstara tasko de la Movado estas la disvastigo de la lingvo. Altrudiĝas la necesoj: informi homojn pri ĝi kaj ĝiaj avantaĝoj, poste instrui la lingvon al ili, kaj tiam kune ĝui — per aplikado — la agrablaĵojn de mondvasta lingvokomunumo. Se estas el si mem dedukteble kion fari, kial ankoraŭ plani? UEA respondis tiun demandon per la ĝisnunaj laborplanoj de la Esperanto-movado. Ili montras al la kunlaborema esperantisto la multajn kampojn de realigado sub la diversaj gvidpostuloj. En tiu senco laborplano estas detaligo de la ĉeftaskoj, katalogo kiu helpas, ke neniu detalo forgesu.

Konsekvenco el tiu klariga principo estas la abundo de la farindaj laboroj. Kvankam la intenco estis, montri al la konsultanta esperantisto inter ĉiuj taskoj ankaŭ ion por ŝi aŭ li, la amaso evidentiĝis fortimiga. Ĉiu ie iom, tio estas formo de investo de fortoj, kiu neglektas nenion, sed kiu nenie kondukis al konvinkaj sukcesoj. UEA kaj la tuta Movado aktivis nun jam dum multaj jardekoj laŭ laborplanoj kun ampleksaj katalogoj — jaroj de bonaj sukcesoj, sed ankaŭ de neatingoj.

Tiu longa sperto permesis vidi ankaŭ la malfortajn flankojn de tiu maniero de laŭplana agado. La ideo konkritiĝis, ke speciala akcento sur kelkaj el la tuto de ĉiuj taskoj devus fari sukcesojn pli verŝajnaj. La aliaj taskoj kompreneble suferus. Sed, se la prioritataj kampoj vere alportus rimarkeblajn sukcesojn, tiu ondo tirus ĉiujn facetojn de Esperanto supren. Tion konsiderante la Komisiono pri Planado de la Komitato de UEA decidis, submeti al la decidorganoj de la Movado proponon por nova laborplano, kun elekto de kelkaj taskoj kiel unuarangaj. Tio signifas — jen la alia flanko de la medalo —, ke sufiĉe multaj taskoj ne troviĝas en la rekomenda listo de la plano.



Laborplano estas detaligo de la ĉeftaskoj: d-ro Werner Bormann (meze) dum la antverpena UK (Foto T. Kehlet)

La Komisiono konstatis, ke kunsidoj dum la Universallaj Kongresoj ne disponigas la necesan tempon por la bezonataj diskutoj. Tial okazis en 1981 du seminarioj, en Rotterdam (informado) kaj en Bad Saarow, GDR (aliaj kampoj de planado), kies rezultoj estis la konstato, ke la Movado havas kvar ĉeftaskojn sur jenaj kampoj: 1) informado, 2) eduko (de niaj kunlaborantoj) kaj instruado, 3) aplikado, 4) prizorgado de la rimedoj por la laboroj supre menciitaj. En ĉiuj el la kvar ĉefaj kampoj estu prioritare prilaborataj kvin detalaj punktoj, tiel ke ĉiukaze la subtasko sur la unua loko trovu prizorgadon kaj, nur se restas fortoj (kunlaborantoj, mono k.s.), ankaŭ la dualoka tasko estu atakita ktp.

Tiel listiĝas 20 ĉefaj agadkampoj laŭ la opinio de la partoprenintoj de la menciitaj seminarioj kaj de la Komisiono pri Planado:

I Informado

- 1) Komunikigi informojn pri Esperanto kaj ĝia movado al la amaskomunikiloj por ilia pluinformado al la ĝenerala publiko,
- 2) informi la socipolitikajn mediojn pri Esperanto kaj ĝia movado (ekz. parlamentojn, registarojn kun iliaj

LA CENTRA OFICEJO DE UEA

serĉas novan oficiston precipe por la financa administrado

La ĉefaj taskoj inkluzivas planadon kaj buĝetadon, pretigon de spezokontoj kaj bilancoj, gvidadon kaj kontrolon de kontumado (inkluzive de la alilandaj oficejoj), rilatojn kun bankoj kaj similaj instancoj, investadon de la kapitalo, kalkuladon de salajroj, impostoj, asekurkotizoj kaj rento kaj korespondadon pri financo kaj kontoj.

Spertoj kun diversvaluta kontumado kaj kun komputilaj sistemoj kaj scipovo de la nederlanda lingvo estas avantaĝoj.

Salajronivelo inter 30 000 kaj 36 000 gld. jare malnete. Eklaboro en Roterdamo prefere frue en 1983.

Interesitoj bv. skribi al la ĝenerala direktoro, UEA, Nw. Binnenweg 176, NL 3015 BJ Rotterdam aŭ telefoni al (010) 36 15 39.

ministerioj, gravajn sociajn organizaĵojn, sindikatojn ktp),

3) aliri pedagogiajn kaj edukajn instancojn kun informoj pri kontribuoj kaj ebloj de Esperanto al iliaj celoj,

4) informi instancojn de scienco kaj teknologio pri Esperanto,

5) atentigi turismajn mediojn pri Esperanto.

II Edukado kaj instruado

1) Prizorgi la internan edukadon de niaj kunagantoj kaj informi ilin, kun la celo plialtigi ilian agadnivelon,

2) precizigi la celojn sur la kampo instruado, t.e. fari planojn por plenumi la instrulaboron pli celkonscie,

3) precizigi la disponeblajn homajn rimedojn, el kio povus rezulti i.a. iu koncentrigo en la kursoferto,

4) motivi al la ekstera publiko pli bonan akcepton de nia instruoferto, tiel ke la kursoj estu pli bone vizitaj,

5) pliefikigi la instruadon de Esperanto.

III Aplikado

1) Uzi Esperanton en profesiaj rondoj (faka agado, sed en malvasta difino: vivtenaj fakoj),

2) fari sociajn agadojn per Esperanto,

3) verki kulture en Esperanto kaj partopreni la kulturan vivon de la esperantistaro,

4) akceli la uzon de Esperanto en sporto kaj turismo,

5) apliki Esperanton en iuj aliaj kampoj.

IV Prizorgado de la rimedoj

1) Ordigi nian laborforton nove per sistemo de komisionoj kaj laborgrupoj sur ĉiuj agadniveletoj, por laborigi pli da esperantistoj,

2) reorganizi la delegitan reton de UEA,

3) pliigi la oferton de turismaj servoj de la Movado,

4) aktivigi la Centron de Esploro kaj Dokumentado (CED) kaj la Bibliotekon Hodler de UEA,

5) pliigi la komercajn enspezojn ĉe ĉiuj organizaĵoj de la Esperanto-movado.

Evidente, multaj ŝatataj kaj kutimaj taskoj ne troviĝas en tiu listo aŭ staras sur malfrua loko. Bona ekzemplo estas kursoj. Ties malfrua pozicio en la laborplano signifas la konsilon al ĉiuj pripensantoj de kursekpreto, ke ili unue studu mem la arton instrui, tiam ili zorge planu la entreprenon, interkonsiliĝu kun aliaj instruantoj, ankoraŭfoje klopodu pri pli da partoprenantoj — kaj nur tiam ek al la kurso mem.

En la listo mankas, ekzemple, la revuo *Esperanto*, ĉar ĝi ne estas tasko por la tuta Movado. Ne enestas la sinturno al UN kaj al Unesko; tio estas unu el la multaj subpunktoj de I, 2), kaj do ĝi estas ne eligita, sed ne troviĝas sur iel elstara loko. En la preparaj diskutoj por la laborplano estis klare, ke la nemencio ankaŭ de tiu ĉi punkto kaŭzos diskutojn. Sed se oni volas havi prioritatojn por unuopaj kampoj el la tuto, tiam neeviteble iuj taskoj ricevas nur flankan atenton.

Tamen estas du kriterioj en tiu propono de laborplano, kiuj certigas, ke gravaj mankoj ne ekestos. Ja la nova laborplano estas konsilo al la tuta Esperanto-movado. Kie troviĝas laboranta centro, de loka grupo ĝis la estraro de UEA, ĝi agu en la kvar laborkampoj pri la priori-



F. Szabó-Felső kaj G. Maertens, ĝenerala sekretario kaj prezidanto de UEA: Laborplano ne koncernas nur la Estraron kaj Komitaton, sed la tutan Movadon. (Foto T. Kehlet)

tataj taskoj, de n-ro 1 ĝis n-ro 5. Sed tio tamen ne validas ekskluzive. Kiu havas tute specialan ligitecon al aparta kampo, tiu flegu ĝin. Ekzemple, estas rekomendinde por fajrobrigadistoj labori por Esperanto en la kontraŭfajra sfero, universitatanoj traktu sciencajn temojn, ankaŭ fervojistoj adaptu la ĝeneralaĵojn de la laborplano al la fervoja medio (do la unuaranga alpaŝo de amaskomunikiloj estu ĉe ili sinturno al ĝeneralaj komunikiloj por fervojistoj). Ĉar estas multaj specialistoj en la Esperanto-movado, la prilaborado de specialaj taskoj ne ĉesos, kvankam la laborplano ne enhavas eksplicite tiajn alvokojn.

Due, la laborplano lasas lokon por specialaj taskoplanoj. Tio certe okazas dum la nuna evolufazo, ĉar alproksimiĝas la grava dato de la centjariĝo de Esperanto. Jam prilaboras tiun datrevenon aparta komisiono de respondeculoj el la tuta Esperanto-movado. Plano por festi la jubileon kun kulmino en 1987 estas nun ellaborata. Tio neniel ĝenas ellaboron kaj realigon de ĝenerala laborplano.

Tria elemento de sekureco estas la limigita periodo de la laborplano. Ĝi estu valida dum nur kvin jaroj; se ĝi estos akceptita en 1983, ĝi marku la ĉefaĵojn ĝis 1988. Dum tiuj jaroj la esperantistoj nepre sekvu ĝin, sed ili samtempe esploru kaj pripensu la spertojn por nova fasko da prioritatoj dum la postaj kvin jaroj. Tiel eblas korekti malfavorajn rangigojn, kvankam eble la nunaj sinsekvoj montriĝos tute pravaj kaj neniuj ŝanĝoj estos bezonata.

La elekton de tio, kio estu prioritata, partoprenis nur malmultaj personoj, kiuj ĉeestis la menciitajn seminariojn. Tial prave leviĝas la demando, ĉu ilia opinio estas reprezenta por la Movado. Nun la Komisiono pri Planado sondas la ĝeneralan opinion de la Movado; al tio servu ankaŭ tiu ĉi artikolo. Leteroj de legantoj estas bonvenaj. La Komitato de UEA volas fari sian decidon pri la nova laborplano dum la Universala Kongreso en Budapeŝto, 1983.

D-ro Werner Bormann

Du vienaj konferencoj

VIENO, kiu antaŭ kelkaj jaroj konstruis tutan "UN-urbon", efektive fariĝas grava regiona centro de Unuiĝintaj Nacioj. Tie nun laboras pluraj fakoj de la monda organizaĵo kaj ĉiam pli ofte okazas gravaj internaciaj konferencoj. Tial UEA antaŭ kelka tempo nomis d-ro Hans Michael Maitzen, iaman prezidanton de TEJO, esti la konstanta reprezentanto de la Asocio ĉe la UN-centro en la aŭstra ĉefurbo.

Preskaŭ samtempe kun la 67a UK en Antverpeno komenciĝis en Vieno Monda Asembleo pri Maljuniĝo, al kiu UEA sendis d-ro Maitzen kiel sian reprezentanton. Ankaŭ alia esperantisto, d-ro James Lieberman (Usono), ĉeestis parton de la Asembleo. La samtempo de la viena konferenco kaj la antverpena kongreso montriĝis esti aparte malkonvena, ĉar ĝi malhelpis, ke la speciala rezolucio pri la maljuniĝo (vidu nian septembran numeron, p.149), akceptita en Antverpeno, prezentiĝu en la viena kunveno. Tamen, tiu rezolucio intertempe atingis la koncernajn instancojn de UN. D-ro Maitzen raportis, ke liaj kontaktoj kun pluraj reprezentantoj de UN kaj de neregistaraj organizaĵoj en tiu konferenco estis tre valoraj kaj instruaj.

Tuj post la Monda Asembleo pri Maljuniĝo en Vieno okazis alia UN-konferenco, kie UEA partoprenis pere de la sama reprezentanto. Eble pro tio, ke la dua



H. M. Maitzen parolas dum Unispace-82 en Vieno

konferenco — Unispace-82, kiu traktis la utiligon de la ekstera spaco — estis pli proksima al la profesio de Maitzen (li estas astronomo), la reprezentanto de UEA tre aktive partoprenis ĝian laboron. Interalie li parolis en la ĝenerala debato de la konferenco. En sia raporto d-ro Maitzen (kiu parolis en la hispana) jene skizis la enhavon de sia interveno:

"La centra enhavo de tiu alparolo estis la akcento je la **kulturaj** eblecoj, kiujn ofertas la spacteknologio, pre-

cipe la ĉiam kreskanta nombro de komunikad-satelitoj. Mi donis la akcenton al la kultura aspekto, ĉar tio estis la ponto al la inkluzivigo de la lingva problemo, sed ankaŭ pro mia impresoj, ke la kulturaj implicoj estis tro malmulte traktitaj dum tiu konferenco, kiu ĉefe rilatis la teknologian aspekton de la utiligo de la ekstera spaco. Post mia parolado tuj venis al mi s-ro Mustapha Masmoudi, tunizia delegito, kaj montriĝis, ke li estis en la UK en Antverpeno kaj tie parolis pri siaj spertoj en la Unesko-komisiono pri la komunikado. Ŝajnas, ke oni devas tre bone varti lin, ĉar li multflanke teorie samopinias kun ni."

Okazis ankaŭ pliaj kontaktoj inter Masmoudi kaj Maitzen en Vieno, en kiuj la ĉefgasto de la antverpena UK interesiĝis i.a. pri lingvaj trajtoj de Esperanto. Maitzen rakontas, ke dum unu el tiuj diskutoj, nov-alveninto al la tablo demandis s-ro Masmoudi, ĉu ankaŭ li estas esperantisto, al kio la respondo estis "Ankoraŭ ne".

REAGOJ:

Malproblememo

TIU TERURE TORDA VORTO deziras esprimi la opinion: serĉi problemojn tie, kie ili ne ekzistas. Ĉi tio rilatas la artikolon en la revuo *Esperanto* (jul/aŭg. 82) "— kian Esperanton instrui?" de Bernard Golden pri "ĝi". Li citas artikolon aperintan en *Sekso kaj egaleco*, sed ankaŭ en aliaj revuoj (ekzemple, en la jugoslavia *Voĉo*) aperis opinioj pri tiu artifice kreita problememo.

Zamenhof mem en siaj *Lingvaj respondoj* skribas: "Se ni volas esti pedante gramatikaj, tiam ni devus uzi la vorton 'ĝi' ne sole por 'homo', sed ankaŭ por ĉiu alia analogia vorto...". Lia esprimo "analogia vorto" povas signifi ĉion rilatantan al homo, kaj tio estas profesioj, titoloj, okupoj, malfermitaj same al viroj kaj virinoj. "Ĝi" do estas normala, fundamenta pronomo, kiun nur la praktiko senjuste humiligis, permesante uzi ĝin kiel anstataŭon por bestoj kaj objektoj. Necesas nur komenci kuraĝo uzi tiun vorton por homoj en singularo, se sekso nekonata. Iniciati tion devus renomaj revuoj kaj elstaraj publicistoj kaj verkistoj. Aliaj sekvos.

Kial neniun sin sentas malagrabla tuŝita aŭdinte aŭ leginte: *Estis multaj homoj: ili silentis. Estis multaj bestoj: ili kvietis. Estis multaj rozoj: ili odoris...* Bezonate estas akiri la saman rajton por la singulara "ĝi", kiun jam ekde la komenco posedas la plurala "ili". Nur tio malhelpos danĝeran elpensadon de tute nefundamentaj, eĉ kontraŭaj al la "deklaracio", novaj pronomoj, kia "ri". Cetere, kial "ri"? Proponitaj elpensaĵoj "gi", "ji" aŭ "zi" egalas al "ri". Egalas en sensenco. Reago al tiaj atencoj al la lingvouzo devus esti pli energia. Ankaŭ fare de la Akademio. Diskuti pri tiaj temoj en malfermitaj kongresaj kunsidoj de Akademio estas multe pli necese, ol respondi al simplaj lingvaj demandoj, kiel okazis en Antverpeno.

Emilija Lapenna

Premioj atendas gajnontojn

”POR KE konkurso estu tutmonda, ne sufiĉas nomi ĝin tia. Dum ok jaroj da oficado ĉe Belartaj Konkursoj de UEA, mi ne povis eviti ripetan zorgon pri tiu partoprena malekvilibro en la Konkursoj, kiu plej multe evidentas: nome, ĝia superreganta eŭropeco kaj sekva manko de aŭtentika internacieco. Ekde 1975 ĝis la pasinta jaro, partoprenis la Konkursojn entute 171 personoj, el kiuj 149 estis eŭropanoj, kaj nur 22 el aliaj mondpartoj. Do, 87-procente eŭropa, 13-procente ekstereŭropa estis la partopreno en tiuj t.n. internaciaj konkursoj dum tiu 8-jara periodo. Se ni rigardas pli malproksimen en la pasinteco, ni konstatas similan proporcio; ekzemple en la jubilea libro *25 jaroj; Antologio de Belartaj Konkursoj* (1977), 85% de la originalaj tekstoj estas verkitaj de eŭropaj konkursintoj, 15% de ekstereŭropaj.”

Tio estas fragmento el la antverpena raporto de Baldur Ragnarsson, prezidanto de la Belartaj Konkursoj. Per tiu citaĵo ni nun ne volas malinviti eŭropajn konkursantojn (des pli ke ankaŭ en tiu kontinento ekzistas kelkaj landoj, el kiuj malofte venas konkursaĵoj), sed nur emfaze inviti la neeŭropanojn. Jen detaloj por 1983:

Poezio originala: Sen fiksita maksimuma longo de konkursaĵo. Tri premioj (250; 175 kaj 100 guldenoj).

Prozo originala: Maksimuma longo de konkursaĵo 200x65 tajpospacoj. Tri premioj (250; 175 kaj 100 guldenoj).

Eseo pri temo lingva, literatura, historia aŭ sociologia, prefere en ligo kun la Internacia Lingvo (longo ĉ. 400x65 tajpospacoj). Nur unu premio – Premio Luigi Minnaja – en la valoro de 310 guldenoj.

Teatraĵo originala: Maksimuma ludodaŭro 25 minutoj. Tri premioj (250; 175 kaj 100 guldenoj).

Infanlibro de la Jaro: Oni rajtas proponi ĉiujn infanlibrojn kiuj aperis dum la jaro 1982, originalajn kaj tradukitajn. Nur unu premio (525 guldenoj).

Fotografio: Minimuma formato 13x18cm. Fotoj povas esti nigrablankaj aŭ koloraj. Tri premioj (250; 175 kaj 100 guldenoj).

Kutime oni aljuĝas ankaŭ ekstran premion ”Nova Talento”, kiu iras al la plej bona konkursanto neniam antaŭe premiita (175 guldenoj; la nomo gravurita sur la pokalon ”Henry Harabaĝiu”).

La konkursaĵoj en la literaturaj branĉoj devas esti senditaj en 4 ekzempleroj al la adreso de la sekretario de la Konkursoj: s-ro Alec Venture, 22a Grosvenor Road, Wallington, Surrey, Britio SM6 0EF. La konkursaĵoj devas atingi la sekretarion plej malfrue la 31an de marto 1983. Por la branĉo ”Infanlibro de la Jaro” oni sendu po 3 ekzemplerojn de la koncerna libro al la adreso de la Centra Oficejo de UEA en Roterdamo, same antaŭ la 31a de marto 1983. La konkursaĵoj en la branĉo ”Fotografio” estu adresitaj al: LKK de la 68a UK de Esperanto, Pf. 193, H-1368 Budapeŝto, Hungario, kaj atingu la adreson antaŭ la 1-a de julio 1983.

Sur ĉiuj konkursaĵoj estu klare indikita la konkursa branĉo. Se tion permesas la poŝtaj reguloj en la koncerna lando, oni aldonu po 5 ĝuste stampitajn internaciajn respondkuponojn por ĉiu branĉo en kiu oni konkuras. Vi memoru, krome, ke la konkursaĵoj en la literaturaj branĉoj devas esti signitaj per pseŭdonimo, kaj ke oni en aparta koverto, kun indiko de tiu pseŭdonimo, sendas sian plenan adreson al la sekretario de la Konkursoj. Se vi havas pliajn demandojn pri la Konkursoj aŭ se vi deziras havi la plenan tekston de la koncerna regularo, skribu al la adreso de la sekretario.

MONDA ĴAMBOREO EN KANADO:

Dudek kvin premioj po 200 kanadaj dolaroj

PRO ANONIMA DONACO, Skolta Esperantista Ligo (SEL) povas nun lanĉi konkurson kun allogaj premioj. Temas pri la sumo de po 200 kanadaj dolaroj por 25 skoltoj aŭ skoltestroj, kiuj plej bone kapablos paroli Esperanton, kiam ili atingos la Mondan Ĵamboreon en julio 1983 en la kanada provinco Alberta. Ĉar tiu sumo nun egalas al 162 usonaj dolaroj aŭ 445 guldenoj, ĝi do prezentas konsiderindan subvencion por la vojaĝkostoj al la plej granda monda renkontiĝo de la skoltoj.

Ekzamenantoj, kiuj juĝos la lingvouzon de la kandidatoj, estos Norman Henderson, kanada nacia reprezentanto de SEL, kaj Paul Ronald, membro de la centra komitato de SEL kaj administranto de la konkurso (adreso: 45, 10th Ave., Roxboro, Que., Kanado H8Y 2N3).

Tamen, ni bezonas helpon de la esperantistaro por diskonigi la konkurson inter la skoltoj. Ni tial petas ĉiun landan asocion kontakti la ĉefsidejon de la nacia skolta organizaĵo. Tie oni demandu, ĉu ekzistas landa gazeto por skoltoj aŭ skoltestroj. Se ĝi ekzistas, oni liveru al ĝi mallongan artikolon pri la konkurso. Oni ankaŭ petu liston de tiuj, kiuj estas elektitaj por iri al la Ĵamboreo. Kiam oni disponas pri tia listo, necesus sendi cirkuleran leteron al ĉiu partoprenanto de la granda renkontiĝo. Se montriĝos necese, ni povos pagi la afrankokostojn. En la kontaktoj kun la skoltaj organizaĵoj estas konsilinde menci, ke Baden-Powell, la fondinto de la skolta movado, firme rekomendis al ĉiuj skoltoj lerni Esperanton. Konvenas atentigi ankaŭ, ke Esperanto estas akceptita kiel fako por interpretista insigno kaj ke internacia movado kiel la skolta bezonas internacian komunikilon, precipe dum tiaj internaciaj aranĝoj, kia estos la Ĵamboreo en Kanado en kiu partoprenos ĉ. 16000 skoltoj el cento da landoj.

U.P.R.

Pri internacilingvaj studoj

LA 1-an DE SEPTEMBRO 1982, vespere, en la konferencejo de Nacia Eduka Halo en Tokio, kolektiĝis 90 personoj (inter kiuj triono estis neesperantista publiko) por aŭskulti prelegojn de tri lingvistoj. Tiu ĉi kunveno estis nomita "Seminario pri Internacilingvaj Studoj", kiun organizis Japana Esperanto-Instituto, okaze de la 13a Internacia Kongreso de Lingvistoj, unuafoje aranĝita en Azio.

Kiam JEI informiĝis pri tiu lingvista kongreso okazonta en Tokio, ni komencis kontakti lingvistojn esperantistojn enlande kaj eksterlande pri la eblo partopreni en la kongresaj aranĝoj pere de faka kunsido aŭ aparta seminario, kiu ligiĝus al Esperanto. Kvankam kelkaj el la demanditaj lingvistoj sugestis enkadrigi ian internacilingvan kunvenon dum la kongreso, montriĝis, ke nia peto al la organiza komitato iris malfrue. Tial JEI decidis aranĝi la Seminarion en la periodo de la kongreso, ĉar ni jam en majo eksciis, ke tri-kvar lingvistoj esperantistoj el eksterlando sin anoncas ĉeesti la kongreson, krom kelkaj japanaj movadaj samfakuloj. La organiza komitato de la lingvista kongreso konsentis meti en la oficialan dokumentujon la invitilon al nia

tial venis al la oficejo de JEI jam pli ol 60 rezervpetoj, kio plenigis la planitan nombron, kaj ni tuj devis aldoni 40 pliajn seĝojn antaŭvide al la senanoncaj ĉeestontoj.


Krom tio, ni planis, ke la Seminario okazu en alia maniero rilate la interpretadon por neesperantista publiko, nome, per samtempa interpretado inter Esperanto kaj la japana lingvo, por tiel ŝpari la tempon kaj samtempe impresi la kunvenantojn pri la vivanteco de Esperanto kiel labora lingvo.

La 29an de aŭgusto okazis la oficiala akcepto por la internacia kongreso de lingvistoj. Ankaŭ la subskribinto ĉeestis ĝin kune kun japanaj kaj eksterlandaj lingvistoj esperantistoj. Dum tiu akcepto, ni interparolis kun dekoj da lingvistoj el diversaj landoj kaj trovis, ke ili pli-malpli informiĝas pri Esperanto.

La 1-an de septembro, la 100-seĝa konferencejo estis preskaŭ plena de ĉeestantoj, duono el kiuj portis sur la oreloj la aparateton por aŭskulti la samtempan interpretadon. Ni ne forgesu menci, ke ĉiu pagis 500 enojn (ĉ. 5 guldenojn) kiel kotizon de la Seminario.

La tri prelegoj estis jenaj:

1) "Kibernetika teorio kaj empiriaj rezultoj de la lingvo-orientiga instruado de la Internacia Lingvo — kiel bazo de pliposta lernado de etnaj lingvoj" de d-ro Helmar Frank (direktoro de Instituto pri Kibernetiko ĉe la Universitato de Paderborn, FR Germanio);



Seminario (en tri lingvoj: Esperanto, la japana kaj la angla).

Plej gravas por la organizado de tia publika kunveno atingi la maksimuman informeblecon pere de gazetoj kaj ĵurnaloj. Faka monata revuo prianoncis la Seminarion jam en la komenco de aŭgusto, kaj ankaŭ pluraj semajnaj gazetoj aperigis nian anoncetoon; kelkajn tagojn antaŭ la afero gravaj ĵurnaloj (*Asahi*, japana, kaj *Daily Yomiuri*, angla) prezentis la Seminarion en bonaj rubrikoj; ĉiuj ĉi anoncoj estis senpagaj. Ĉi-foje ni aparte emfazis en la anonco, ke la interesitoj antaŭe rezervu la sidlokon ĉe la organizanto, JEI, kaj

2) "Aktualaj aspektoj de la lingvoinstruado en multlingva Respubliko Bharato — problemoj inter oficialaj lingvoj kaj komunaj lingvoj" de d-ro Probal Daŝgupto (vicprofesoro ĉe Lingvistika Fakolito de Kolegio Deccan, Puneo, Hinda Unio);

3) "Lingvistika tipologio kaj lingvolernado" de d-ro Dan Maxwell (usonano; scienca kunlaboranto ĉe Teknologia Universitato de Berlino, FR Germanio).

Ĉiu prelegis proksimume 40 minutojn en Esperanto, kun samtempa interpretado en la japanan. D-ro Frank plej oratore prezentis sian kibernetikan teorion kaj akiritajn rezultojn pri la instruado de la Internacia

Lingvo al geknaboj, kiuj montris grandan progreson en la lernado de aliaj etnaj lingvoj poste. Lia raporto estis klara ankaŭ pro pluraj grafikaj de tiuj statistikaj kaj analizaj rezultoj. La interpretado de s-ro Syûiti Yamakawa montriĝis ankaŭ klara, kaj la aparatportantoj kapjesis ĉe gravaj punktoj.

La raporto de d-ro Daŝgupto estis ampleksa, ĉar li devis klarigi unuavice, ke en Hinda Unio ekzistas pli ol 1 000 parolaj kaj 20 skribaj lingvoj, neniuj el kiuj estas komprenata de plimulto de la hindaj popoloj. Li tamen lerte prilumis la realismajn aspektojn de la lingvoinstruado kaj -lernado, ĉefe en du lingvoj, la hindia kaj la angla. Por japanoj, parolantaj unu komunan lingvon tra la tuta lando, ne estas facile kompreni tian kompleksan situacion de la vasta sudazia lando, sed la ĉeestantoj atentis pri la ekzistanta lingva konflikto. S-ino Kazuko Kikusima (konata kiel Krizantemo) japanigis la prelegon ne malpli flue ol parolis la raportanto. La tria prelego ĉefe pritraktis la gramatikajn aspektojn de tri lingvoj, Esperanto, la angla kaj la japana, por kompari la facilecon kaj malfacilecon de la lingvolernado. Por multaj japanoj aparte impresa estis tio, ke

d-ro Maxwell bone preparis diversajn malsimilajn punktojn inter tiuj tri lingvoj, kaj tial ili konsentis pri lia konkludo, ke por japanoj la lernado de Esperanto estas pli facila ol lernado de la angla. Lian prelegon interpretis en la japanan lia kolego-lingvisto, s-ro Hito-si Gotoo.

Post la tri raportoj, ni kolektis dekelkajn skribajn demandojn al ĉiu preleginto, el kiuj nur kelkaj povis esti surloke responditaj. Ni do konservas ilin por posta skriba respondo de la koncernaj raportantoj, kiujn ni aldonos al la eldonota dulingva kolekto de la prelegtekstoj.

La malferman kaj ferman salutojn faris s-ino Yukiko Isobe, ĉefdirektoro de JEI kaj prezidis la tutan Seminarion la subskribinto. Tiujn parolojn interpretis s-ro Yukio Izumi, talenta studento de la Universitato de Tokio.

Ni povas diri ke la Seminario estis sukcesa laŭnombro, unuflanke, kaj enhave kaj organize, aliflanke. La nemovada publiko certe komprenis, ke Esperanto funkcias kiel vivanta lingvo.

Yosimi Umeda

KUNLABORO KOREA-JAPANA:

Gejunuloj donas ekzemplon

LA UNUA KOMUNA Seminario inter Japana kaj Korea Junularo okazis de la 7a ĝis la 11a de aŭgusto 1982, ĉe la monto Sorak en Korea Respubliko. Partoprenis 28 japanoj kaj 20 koreanoj, al kio aldoniĝis ankaŭ 40 koreaj partoprenantoj de la samtempa kaj samloka lingvistuda kunloĝado. La tuton organizis Korea Esperanto-Junularo kaj du japanaj TEJO-kontaktuloj: Takaaki Ohsawa (nome de la studenta E-organizaĵo Rondo Harmonia) kaj Yukio Izumi (nome de la aliaj gejunuloj en la japana E-movado). Oni nun planas, ke tiaj komunaj seminarioj fariĝu tradiciaj, ĉiujaraj, tiel ke la movadaj kontaktoj inter la du najbaraj landoj ne plu limiĝu al hazardaj vizitoj. La seminario devus okazi meze de 1983 en Kameoka, Japanio.

Estas interese noti, ke la unua instigo por ĉi tiu aranĝo ligiĝas al Amri Wandel, prezidanto de TEJO, kaj lia vizito al tiuj aziaj landoj antaŭ du jaroj.

La ĉeftemoj de la Seminario estis: "Por kio ekzistas Esperanto?" kaj "Kio estas la plej bona instrumentado de Esperanto por japanoj kaj koreanoj?". Montriĝis tamen, ke la du temoj ne estis funde eldiskutitaj, kaj ke nur deko da personoj partoprenis en la koncernaj diskutoj. La organizantoj el tio lernis, ke estonte necesas plani la diskutojn en malpli grandaj laborgrupoj kaj elekti pli konkretajn temojn.

Pri la unua temo raportis Atusi Hirai (Japanio), kiu emfazis la kontribuon de diversaj japanaj E-grupoj al la paco. Sin'iti Yamaguti (Japanio) parolis pri la kultu-

ra kontribuo de Esperanto kaj ĝia helpo en la ĝenerala lingvostudado. Ĝongrjol Ĝang (Koreo) skizis la komencan historion de Esperanto, kaj lia samlandano Songĉung Ĝong atentigis pri la rolo de Esperanto rilate la forigon de la antaŭjuĝoj, kiuj sentiĝas en la rilatoj inter la du landoj. Aŭdiĝis ankaŭ opinio, ke la Esperanto-movado fine devus celi sian propran malaperon, kiam la uzo de la Internacia Lingvo ĝeneraliĝos. Ankaŭ la temo pri la instruado de Esperanto estis amplekse prezentita, kio montriĝis esti valora interŝanĝo de la spertoj. Kiel en aliaj landoj, unu el la plej gravaj problemoj estas la manko de kompetente trejnitaj kursgvidantoj. Koreanoj aldone plendis, ke la trijara deviga soldatservo en tiu lando negative influas la kon-



Marbordaj petolaĵoj en la sablo: Kvankam la korea-japana seminario havis abundan programon, eblis iom ankaŭ ludi.

tinuecon de la junulara E-movado per la longdaŭra forpreno de spertaj gvidantoj kaj instruantoj.

Ekster la kadro de la du ĉeftemoj okazis ankaŭ pluraj aliaj prelegoj kaj diskutoj. Hisasi Kitagawa (Japanio) parolis pri la lingvolernado kiel spirit-invadanto. Lia prelego — "Psika komplekso al angle-parolantoj kaj blankuloj" — tuŝis ankaŭ aliajn interesajn facetojn. La koreanino Hjangsuk Ĉue prelegis pri "Kostumo kaj sekso", kaj Giŭan Bak parolis pri la nuna korea alfabeto, kreita en 1446. Okazis ankaŭ tuta aro da aliaj, pli distraj, prelegoj (ofte kun lumbildoj) kaj diskutoj.

Tre grava parto de la Seminario estis pluraj ekskursoj kaj eksterprogramaj renkontiĝoj, dum kiuj la seminarianoj kaj la partoprenantoj de la kunloĝado povis vere konatiĝi kaj sperti (ofte unuafoje) la utilon de komuna lingvo. Eble la plej atendinda konkludo estas la malkovro, ke oni ne devas fari longajn kaj multekostajn vojaĝojn al Eŭropo aŭ Ameriko, por praktiki la Internacian Lingvon. Per ĉi tiu sukcesa Seminario la koreaj kaj japanaj gejunuloj donas belan ekzemplon, kiun povus sekvi ankaŭ la ceteraj movadaj organizaĵoj en tiu mondparto precipe, sed ankaŭ aliloke.

(Laŭ la bulteno *Japanio aktivas*)

POR GEPATROJ:

Atento al la denaskaj lingvouzantoj

MIKSITECO de esperantistaj societoj ne malofte bremisas la evoluon de la Movado: fakuloj preferas agadi en la rondo de samfakuloj, junuloj laŭeble serĉas kontakton ne nur kun veteranoj, la pli aĝaj homoj same havas siajn dezirojn kaj idealojn, ankaŭ la infanoj bonfartas pleje en infana medio.

Precipe ili, la denaskaj esperantistaj infanoj, bezonas kaj meritas specialan zorgon de la Movado. Klubaj kunvenoj, la tradiciaj Esperanto-aranĝoj, kie prezentas sin amase komencantoj, anstataŭ firmigi la jam akiritan lingvoscion de infanoj, rapidigas ilian seniluziiĝon pri Esperanto. Precipe pro tiuj kaŭzoj estas valoraj Renkontoj de Esperantistaj Familioj (REF), kaj ankaŭ aliaj, tre maloftaj porinfanaj aranĝoj, kiel ekzemple Pupteatra Internacia Festivalo aŭ Infana Kongreseto de UEA.

REF ne estas aranĝo ĉefe por la plenkreskaj familianoj, sed por la plej junaj infanoj, por denaskaj esperantistoj, kiuj ankoraŭ ne havas la kapablon memstare eniri la medion de samaĝuloj pro la simpla fakto, ke esperantistaj familioj loĝas dise tra la mondo.

La ĉi-jara REF, jam la kvara, okazis en Hungario, for de urboj kaj vilaĝoj, en izolita montara domo, kie krom la aliĝintaj familioj ĉeestis neniuj. Tiel povis okazi senĝene amika kunloĝado, ankaŭ ĉiutaga kunlaborado pri la necesaj farenaĵoj: preparo de manĝoj, ĉambro-ordigoj, kolektado de arbaraj fruktoj kaj ligno, por fari vespere fajron. Libervole, eĉ plezure la infanoj parto-

prenis en ĉiuj agadoj. Dume okazis senĉesa babilado, kompreneble ne nacilingva. La ĉeestantaron konsistigis hungaroj, kroatoj kaj poloj, inter ili 8 denaskaj esperantistaj infanoj en la aĝo de 3 ĝis 8 jaroj. Kiel ĉiam dum REF, la infanoj grandparte jam konis unu la alian, eĉ amikiĝis en la antaŭa tempo. Sed ĉeestis ankaŭ novuloj, kiuj facile akordiĝis kun la aliaj, pli spertaj, pli aĝaj.



Kutima urba komforto mankis, tamen neniuj plendis, neniuj grumblis aŭ enuis; la senlima inventemo de la infanoj kaj la naturo mem diktis la programon, tre varian. Kiel la regulaj manĝoj, tiel ripetiĝis ankaŭ programeroj: matene la infanoj gimnastikis, posttagmeze okazis danco- kaj kanto-lernado; la infanoj ĉiutage, sen ajna instigo, post la tagmanĝo legis Esperanto-lingvajn fabelojn, por si mem aŭ, laŭte, por la pli junaj, kiuj ankoraŭ ne scipovas legi. Ili precipe ŝatis la librojn *Asteriks la gaŭlo*, *Krabo kun oraj pinĉiloj* kaj la ĉinajn fabelojn.

La infanoj estis surprize memstaraj, kion pruvas i.a. kvaŭzaŭ sekrete preparita programo kun kantoj, pupteatra prezento kaj dancoj (kiujn du infanoj lernis dum la Infankongreseto en Belgio). Pro tiu memstareco la gepatroj havis sufiĉe da tempo por preparoli edukajn kaj aliajn interesajn temojn.

Ĉar la ĉeestantaro povis vidi denove la utilon de la aranĝo, oni decidis okazigi la Renkonton ankaŭ en la venonta jaro. La loko estos la adriatika insulo Pag, en Jugoslavio, unu semajnon post la 68a Universala Kongreso. Familioj, kiuj partoprenos la Kongreson en Budapeŝto, povos pasigi la semajnon inter la UK kaj REF kune kun hungaraj esperantistaj familioj, kaj ili povos kune vojaĝi al Jugoslavio.

Simile kiel en la antaŭaj 4 jaroj, REF ankaŭ en 1983 havos novan karakteron kun nova ĉefprogramo. Dum la unua REF (1979, Hódmezővásárhely, Hungario) oni okazigis seminarion pri infana dulingveco. Poste (1980, Szombathely, Hungario) la partoprenantoj spektis eksperimenton kaj pridiskutis instruajn, edukajn problemojn. La tria REF (1981, Žilina, Ĉeĥoslovakio) estis akompana aranĝo de seminario "Apliko de Esperanto en Scienco kaj Tekniko", kie la infanoj prezentis sin antaŭ multnombra publiko, kaj la gepatroj faris klarigon pri la esenco de denaska esperantismo. Kaj fine ĉi-jare (Augustin-tanya, Hungario) estis ne nur flanko celo la kutimiĝo de infanoj al naturaj viv- kaj kondut-cirkonstancoj.

Ernő Csiszár

Buĝeto por 1983

(en nederlandaj guldenoj)

KOSTOJ

Salajroj, malnete	296 000
Sociaj asekuroj pagataj de UEA	58 200
Salajroj, nete	354 200
Afranko kaj telefono, nete	32 900
Presadoj	12 300
Materialoj	8 500
Riparo kaj prizorgo de maŝinoj	9 500
Trinkaĵoj	1 100
Revizoro	1 100
Helpo GCA al CO k.a.	11 900
Centra Oficejo, nete	77 300
Fotokopiado, nete	3 100
Gasoj, elektro, akvo	10 900
Riparo de la domo, purigiloj k.s.	4 300
Impostoj je la domo, asekuro	4 400
Minus lupagoj pro ĉambroj	-2 400
Oficeja domo, nete	17 200
Preskostoj de <i>Esperanto</i> (10 n-roj)	39 100
Sendokostoj	44 700
Kovertoj	3 000
Grafiko ktp.	33 400
Ekspedlaboro ĉe GCA	18 700
Minus anoncoj	-14 000
"Esperanto", nete	124 900
Preskostoj de la Jarlibro	20 700
Sendokostoj	16 500
Kovertoj	1 400
Grafiko kaj aliaj kostoj	12 600
Minus anoncoj	-11 000
Jarlibro, nete	40 200
Preskostoj <i>Kontakto</i> (6 n-roj)	8 700
Sendokostoj	6 600
Ekspedlaboro kaj kovertoj	3 200
Grafiko	8 200
Redakto, teknika redakto	5 400
Minus anoncoj	-500
"Kontakto", nete	31 600
Veturkostoj oficejaj	6 400
Vojaĝkostoj kongresaj	6 400
Vojaĝkostoj Estraro de UEA	14 500
Vojaĝkostoj Estraro de TEJO	2 100
Reprezentaj kostoj	2 500
Vojaĝkostoj de komisionoj kaj komisiitoj	1 100
Vojaĝ- kaj restad-kostoj	33 000
Volontula Servo	7 000
Korespondo estrara kaj komisiona	11 400
Bankkostoj; kurzoperdoj	11 200
Donacoj kaj premioj	7 800
Postpagitaj k.a. kostoj	400
Ĝeneralaj kostoj, entute	19 400

Deprezo de la domo, ĉ. 1%	1 800
Deprezo de maŝinoj ktp. 10%	2 900
Deprezo de komputilo 12,5%	12 000
Deprezo programoj k.a. 20%	28 000
Deprezoj, entute	44 700
Sumo de la kostoj	764 000

RIMEDOJ

Kotizoj MJ (Membro kun Jarlibro)	27 700
Kotizoj MA (Membro-Abonanto)	217 000
Kotizoj MJ-K (kun <i>Kontakto</i>)	3 400
Kotizoj MA-K (kun <i>Kontakto</i>)	12 300
Aligitaj membroj UEA	22 600
Aligitaj membroj TEJO	7 900
Simplaj abonoj de <i>Esperanto</i>	10 000
Kolektivaj abonoj <i>Esperanto</i>	6 000
Kongresaj abonoj <i>Esperanto</i>	48 000
Abonoj kaj vendoj <i>Kontakto</i>	10 000
Kolektivaj abonoj <i>Kontakto</i>	4 000
Societo Zamenhof	24 600
Kotizoj de fakaj organizaĵoj	2 000
Kotizoj entute	395 500
Donacoj al la Ĝenerala Kaso	10 000
Vendoj de la Libroservo	226 000
Minus kostoj de la varoj	-147 000
Minus rojaltoj	-6 000
Minus katalogaj k.a. kostoj	-13 400
Triono de sendokostoj	7 000
Libroservo, nete	66 600
Abonoj de nepropraj gazetoj	19 000
Minus kostoj de la abonoj	-14 000
Abonservo, nete	5 000
Grafikaj laboroj Roterdamo, nete	31 700
Antverpena Oficejo, nete	20 000
Novjorka Oficejo, nete	0
Budapeŝta Oficejo, nete	0
20% de kotizoj 68a UK	90 900
50% de licencpago IJK	8 000
Kongresoj, entute	98 900
Turismaj aranĝoj	10 000
Rento, nete	70 000
Kurzgajnoj	10 000
Postricevitaj rimedoj	1 000
Vendo de uzitaj poŝtmarkoj	3 000
Ĝeneralaj rimedoj, entute	14 000
De inventaro pro programado	25 000
De kapitalo dumvivaj membroj	15 300
De Inst. Hodler pro administro	2 000
Kompensoj, entute	42 300
Sumo de la rimedoj	764 000

FONDAĴO AZIO-AFRIKO havas malplenan kason! La gravega agado por Esperanto en la evolulandoj (vidu nian numeron de julio-aŭgusto) dependas preskaŭ ekskluzive de viaj donacoj. Bonvenaj estas ankaŭ malgrandaj sumoj. Pensu pri tio almenaŭ kiam vi sendos vian kotizon por 1983 aŭ faros alian pagon al UEA. Dankon!

Grava, sed nekompleta

Kiu estas kiu en scienco kaj tekniko 1981. Kompilis Christian Darbellay. Neuss: La aŭtoro, 1981. Ilus. 275p. 21cm. Prezo: 36,30 gld.

Ni devas kore danki la kompilanton pro ĉi tiu proveldono, kiu konsistigas gravegan iniciaton. La Movado de longe bezonas ĉi tian "katalogon" de Esperanto-parolantaj sciencistoj, por faciligi iliajn kontaktojn. Ĝoje ni legas, ke "certe sekvos regulaj eldonoj", plibonigitaj.

Oni respektu la averton, ke temas pri proveldono, sed mi malfacile komprenas la saĝon limigi la liston de sciencistoj al 200, kiam sliparo de 600 (aŭ 1 445!) jam ekzistas. Kompleteco estas necesa en ĉi tia kompilaĵo. Kiel oni elektis la homojn estas tute malklare al mi. Taŭga kriterio estus elekti laŭ la nombro de studjaroj en unu fako. Kiel atingi la multajn Esperanto-parolantajn fakulojn, kiuj ne estas en la Movado? Ĉu per nacilingvaj anoncoj samtempe servantaj kiel informado?

La ampleksaj indeksoj entenas ankaŭ la nomojn kaj fakojn de homoj ne listigitaj en la libro mem, en kiu mankas gravaj nomoj. La personaj informoj estas tre netaj, sed ne sufiĉe klaraj grafike. Krome, dediĉi unu tutan paĝon al ĉiu homo ŝajnas nenecese. Glorigilo la libro nepre ne fariĝu.

Temas pri bele presita tajpaĵo dediĉita al la 75-jara jubileo de ISAE. Bedaŭrinde la libron makulas pluraj kuriozaj landnomoj (oni uzu la uzatajn) kaj kelkaj aliaj malatentoj al la akceptita skribbildo de Esperanto. Ĉi tia katalogo devas regule aperi i.a. kiel instigilo al fakulo uzi la neprihontindajn kontakteblecojn, kiujn nia lingvo proponas, kaj por firmigi la eniron de Esperanto en ĝian alvenantan sciencan periodon.

Geoffrey Sutton (Pekino)

Simplavorte kaj delikate

Divershumore, de Rejna de Jong. Glasgow: Kardo, 1980. 36p. Ilus. 21cm. ISBN 0 905149 13 0. Prezo: 10,50 guldenoj.

Ŝajnas al mi, ke la aŭtorino kunvivadas ĉiumomente kun la poezio. Mi eĉ suspektas, ke, dum kuirado aŭ ŝanĝado de bebovindo (se ŝi tion faras) ŝi deklamas por si mem la tutan tempon. Kaj ŝi tion duonkonfesas en sia poemeto "Pri mi".

Tre variaj estas ŝiaj temoj, kiel jam indikas la titolo. Pri simplaj, ĉiutagaj aferoj ŝi parolas aŭ pri scenoj idiliaj, kaj ĉiam adekvate, per simpla, ĉiutaga lingvo, kiun ŝi lerte manipulas. Neniu hermetikaĵo, ankaŭ ne kiam ŝi tuŝas plej seriozajn mondproblemojn, kiel poluciadon


kaj atombombojn. Ŝi daŭrigas paroladi senpretende kaj esprimas pensojn, kiujn iu ajn mense kaj kore sana homo volus mem envortigi, se li havus la saman talenton kiel Rejna de Jong. Eĉ kiam ŝi ateismas, ŝi ne faras pli ol eksterigi la dubojn kaj konfliktojn de normala, racie pensanta homo, sed eĉ tiam ŝi restas delikata, ne uzante nenecesan agresemon.

Bedaŭrinde tro frue post ol oni komencas ĝui la poemkolekton, oni jam atingas ĝian finon. Pro tio mia peto kaj postulo: baldaŭ revenu kun pliaj kaj pli multaj, Rejna!

L.H. Knoedt (Brazilo)

Oni frandu, dum oni povas!

Pretertempe; Versaĵoj, de Aldo de' Giorgi (1924 -). Pisa: Edistudio, 1982. 63p. Ilus. 31cm. Bind. ISBN 88 7036 015 6. Prezo: 18,00 gld.



En ĉi tiu volumo, Aldo de' Giorgi poemas, ĉefe pri amo, iam reciproka kaj poste unuflanka; desegne akompanas Jean Bomford. De' Giorgi direktas dankvorton "al Bruĉjo Kasini, la plej profesinivela eldonisto de nia movado, kiu aŭdacis presaperigi en tia luksa formo miajn subjektivegajn senkoheraĵojn" (p.62). La "luka formo" inkluzivas plurajn preserarojn, infanlibrecan aspekton, kaj klarigon surkovrilan, ke temas pri "originala poemaro", por ke oni ne eraru — malgraŭ la pledo de de' Giorgi: *Por ke vi povu fieri / pri via saĝo / ne malpermesu al mi, / mi petas, / la rajton erari.* (p.51)

Mallongo katenas miajn tajpilajn klavojn. Mi do restos je tiu bedaŭrinda proksimeco al supraĵoj, kiun la diskutformato necesigas. 1) De' Giorgi plektras kelkajn unikajn, atentindajn kordojn — laŭ mi, sur paĝoj 29, 36, 39, 43, 45, 51 kaj la dekstra parto de 53. Eble aliajn paĝojn via aŭdo selektos. Sed ion ĝi trovos inda. 2) Marjorie Boulton verkis tre sentan enkondukon. Leginte ĝin, oni, eĉ se ete, ne plu estas la sama leganto. 3) Ne sufiĉas fotokopie legi la plej legindajn erojn por ŝpari tempon. "Se li verkus nur kelke da perfektaj poemoj, eble pli bone estus por la postpoetoj, sed la mensa malriĉo de lia gento ne estus eliminata. Kaj en tio kuŝas la pravo de liaj eksceso kaj de lia nivela oscilado." (Cito el la antaŭparolo de alia leginda poemaro. Tus, tus!)* De' Giorgi verkis plurajn tute ĉarmajn imi-

* La aŭtoro aludas sian propran antaŭparolon al *Primico* (1977) de R. Tagor. **Tus, tus!** estas eksklamacia ripeto de la koncerna verbradiko, ofta lingva petolaĵo en la CO de UEA.

tojn de iuj niaj korifeoj. Ili servis foramuzi lian memoron de persona malfeliĉo, sed ili estas ankaŭ lud-sukcesoj, kiujn ni lernu ĝui. 4) Se la timige grandnombraj movadoj en Ĉinio kaj aliaj kontinentoj daŭre kreskos, tre baldaŭ estos tro da Esperantaj kulturanoj por ke eblu koni unu la alian. En tiel vasta mondo oni ne plu povos frandi tian ĉi legadon, dum kiu necesas per speciala fortostreĉo distancigi sian legon de sia persona kono de (aŭ scio pri) la individuo. Oni frandu, dum oni povas!

Probal Daŝgupto (Hinda Unio)

Varia kaj konciza stilo

La aventuroj de ŝpar- kaj alia porketoj, de Rik De Roover. Antverpeno: Flandra Esperanto-Ligo, 1982. 80p. Ilus. 21cm. Prezo: 12,00 gld.

Ĉu vi scias, kio estas ŝparporko? En multaj landoj infanoj havas kavajn argilajn porkojn kun fendo por enŝtopi monerojn. La ĉefrolanto de ĉi tiu libro estas ŝparporko, kiu vivas kaj parolas. Ĝi vojaĝas tra urbo, interŝanĝas la rolojn kun preĝeja porkfiguro sen ŝpara fendo, kaj tiel evoluas eta ĥaoso.

Ĉu eble libro taŭga por komencantoj? Ne, ni ne faru tiun kutiman mistakson. La aŭtoro antaŭparole destinas la libron al dekjaruloj, kaj infanoj kaj komencantoj estas du malsamaj literaturpublikoj. Ĉi tio estas infana libro. Krom en la peze formulita titolo la lingvo estas klara kaj trafa, la frazoj frappe mallongaj. De Roover ne lingvoludas, tamen li elĉerpas la eblecojn de la gramatiko por varia, sed konciza stilo kaj uzas riĉan vortprovizon.

Tekniko la libreto estas altkvalita, preskaŭ ne estas preeraroj. La rakonto montras tradician bildon de la familio: sinjoroj kun ĵurnaloj, sinjorinoj ĉarme vestitaj. Entute la enhavo estas tia, kian plenkreskuloj emas nomi "ĉarma". Ĉu tio sufiĉas por forlogi junajn esperantistojn de la televido kaj nacilingvaj bildstrioj?

Klaus Schubert (FR Germanio)

Potencia argumentado

Apologio (197 p.K.), Tertuliano (ĉ. 153-ĉ. 222 p.K.). El la latina tradukis (1980) Gerrit Berveling. Vlaardingen: VoKo, 1982 (2a plene tralaborita eldono). 116p. Unu mapo. 21cm. Voĉoj kristanaj n-ro 2. Prezo: 9,90 guldenoj.

Teologio estas fako; tial estas bone, ke aperu en Esperanto la bazaj verkoj necesaj por la fakuloj. Nun la fako pliriĉiĝis per ĉi tiu redono de fama verko el la 2a jarcento p.K. Tiam ja necesis defendi la kristanisman kontraŭ la miskonceptoj de la pagana mondo. Nun ni legas ĝin ankaŭ por ĝui la potencon argumentadon de la verkinto, Tertuliano, kiu uzis la latinan lingvon kun preskaŭ klasika eleganteco, jen sarkasme jen ironie pilorante la nelogikaĵojn de siaj kontraŭuloj. Li verkis ĝin en 197 p.K., t.e. kvar jarojn post sia konvertiĝo. Lia

posta kariero kiel kristano memorigas pri tiu de nia pioniro de Wahl (esperantisto, idisto, elpensinto de Occidental); tiel Tertuliano, ortodoksulo, montanisto, elpensinto de tertulianismo.

La tradukinto, post la *Didaĥeo* (*Biblia revuo*, 3/1979) kaj la *Evangelio kopta laŭ Tomaso* (Serio de IABO 5), registras plian sukceson ĉi tie, redonante bonege la stilon kaj sencon de la originalo. Tertuliano revivas en Esperanto, kaj ne necesas esti teologo por profiti el ĉi tiu verko. Per la enkonduko (historia fono, Romia Imperio, juda diasporo, la frua (nord-afrika) kristanismo, listo de la verkaro de Tertuliano, lingvaĵo kaj strukturo de la verko), per la notoj, kaj per la aldonaĵoj (Ĉap. XIX de la Fulda teksto, la Martirakto el Skilio de ĉ. 180 p.K., la leteroj de Plinio la Juna al Trajano, glosoj, bibliografio, desegnaĵo de la Romia Imperio ĉ. 106 kaj de la fifama murskribaĵo de la azenkapa krucumito) ĉi tiu verko garantias, ke la akirintoj havos la valoron de sia mono, kaj pli.

D.B. Gregor (Britio)

Abunde pri komputado

Komputado; Tematika numero pri tekstoprilaborado, de Bruce A. Sherwood k.a. Redaktis László Szabó. Budapeŝto: Hungara Esperanto-Asocio, 1982. 59p. Mimeo. 21cm. Prezo: 4,50 gld.

La komputilo proksimiĝas al homo. Redaktis Internacia Grupo Informo-Scienca. Budapeŝto: Hungara Esperanto-Asocio, 1982. Kaseto 60-minuta. Kvar prelegoj (Sherwood, Frank, de Kat, Münnich). Prezo: 18,00 guldenoj.

Ŝajne niaj komputistoj komencis lastjare produkti tekstojn per la linipresilo, tiom abunde ĉi tiuj aperas. *Komputado* kredeble estas konceptita kiel neregula periodaĵo. La nuna numero estas "tematika" pri tekstoprilaborado, kio certe interesos ankaŭ lingvistikemajn personojn kun malmulte da scio pri komputiloj. Enestas artikolo pri ortografio, parolsintezo kaj komputa analizado de Esperantaj frazoj. Alia kontribuaĵo pritraktas projekton en kiu oni enigis en la komputilon ĉiujn dike presitajn vortojn de *Plena ilustrita vortaro* por akiri, ekzemple, laŭfake aranĝitajn vortlistojn. Ankaŭ certe fascina estus la artikolo pri aŭtomata elkribo de informoj el storita literaturo, sed evidente la teletajpila inkubando jam foruziĝis.

La kaseto *La komputilo proksimiĝas al homo* impresas kvazaŭ la prelegistoj troviĝis ĉe Radio Pekino kaj la magnetofono en Budapeŝto. La vortoj bobele emergas el maro de murmuro kiel karbonacido el glaso da Coca Cola. Konsentite, tio ne malebligas finfine la komprenadon de la — certe interesaj — prelegoj: pri programado per vere homa lingvo, aŭtomata tradukado kaj informserĉado per komputilo kaj komunikado kun ĝi. Mi tamen preferas legi la traktaĵojn ol aŭdi tian bendon. Sed restas grava aĉetokialo por ĉi tiu kaseto kiu kompensas la teknikajn mankojn komplete: nome ĉi tie troviĝas la specimenoj de maŝina parolo

pri kiu raportis la gazetaro (inkluzive la supran periodaĵon). Propraorele vi povas konvinkiĝi, ke sciencfiksio atendas ĉe via pordo. La maŝino parolas klare, kvankam rigide. Kvazaŭ profesoro Sherwood konversacias tra tubo. Ĉar, juĝante laŭ la prononcuo, la parolmaŝino havas la usonan varianton de la angla kiel la gepatran lingvon.

Rob Vetter (Nederlando)

Laste aperis...

Avinjo rakontas (1953), Mária Jančová (1908 -). El la slovak trad. J. Záhora kaj F. Revay. Poprad: Asocio de Esperantistoj en Slovaka SR, 1981. 55p. Mimeo. 21cm. Prezo: 4,80 gld.

Brezhoneg... buan hag aes, (La bretona... rapide kaj facile), Per Denez. El la franca trad. Christian Bertin kaj Iwan Kadored. Rennes: Bretagne en Direct, 1982. 61+15p. Ilus. 21cm. ISBN 2 85294 018 3. Prezo: 8,70 guldenoj.

Ĉu vi vidis jam la piedsignon de l' profeto?, János Elem (pseŭd.). El la hungara trad. Vilmos Benczik. Budapest: Hungara Esperanto-Asocio, 1982. 91p. 20cm. ISBN 963 571 102 6. Paralelaj tekstoj en la hungara kaj Esperanto. Aventuroj de turisma grupo, kies veturilo paneis en dezerto. Prezo: 9,00 gld.

Dictionarium museologicum; Germana-Esperanta muzeologia leksikono. Budapest: Muzeumi Restaurátor és Módszertani Központ, 1982. 43p. Mimeo. 21cm. Parta proveldono de pli ampleksa plurlingva terminaro. Prezo: 4,50 gld.

Don Juan' Tenorio; José Zorrilla (1817-1893). El la hispana trad. Luiso Espinalt Mimó. Ascoli Piceno: Gabrielli, 1981. 188p. 20cm. Plejado: Beletro eldonserio 12. Versa dramo, religia-fantasta, en du partoj kaj sep aktoj. Prezo: 24,00 gld.


Esperanto snel assimileren, W. M. A. de Smet (1932 -). Antwerpen: Uitgeverij De Nederlanden, 1982. 151p. 22cm. ISBN 90 6583 028 6. Rapida kurso en 15 lecionoj (kun ekzercoj) por nederlandlingvanoj. Prezo: 27,00 gld.

Gramatiko kaj vortfarado de Esperanto. Pekino: Pekina Esperanto-Asocio, 1981. 280p. 19cm. Ĉinlingva traduko de verkoj de P. Fruictier: *Esperanta sintakso* (1903) kaj *Esperanta vortfarado* (1914). Prezo: 12,00 guldenoj.

Guido Gezelle (1830-1899). Red. B. Peleman. Antwerpen: Orteliusfonds-Uitgeverij MIM, 1980. 112p. Ilus. 31cm. Bind. Luksa, grandformata, bele ilustrita poemkolekto de la plej fama flandra lirikisto de la 19a jarcento. Kun originaloj kaj tradukoj en 12 lingvoj, inkluzive Esperanton. Prezo: 60,00 gld.



VERKOJ DE VERDA MAJO



ĈINA ESPERANTO ELDONEJO

kontakto ALISPECA KAJ PLIOFTA EKDE 1983

Ekde la komenco de 1983, KONTAKTO aperos 6-foje jare (sur 16 paĝoj) kaj enhavos tekstojn destinitajn al la lingve nespertaj esperantistoj. La enhavo kaj stilo de la novspeca KONTAKTO parte similos al la pasintjara "facila" numero de tiu ĉi revuo. La novan KONTAKTON redaktos Anna Brennan. Detala prezento de la nova revuo aperos en nia novembra n-ro.

Hidraŭlika-sanitara terminaro, Félix García Blázquez. Caracas: La aŭtoro, 1982. 46p. Mimeo. 22cm. Terminaro kvinlingva (angla, franca, germana, hispana kaj Esperanta). Prezo: 12,00 gld.

Historio de la lingvo Esperanto; 1887-1927 (unua parto 1911, dua parto 1927), Edmond Privat (1889-1962). Hago: Internacia Esperanto-Instituto, 1982 (fotorepreso). 199p. 18cm. Klasika historia verko, kiu detale prezentas la unuajn kvar jardekojn de Esperanto. Prezo: 18,00 gld.

Internacia kemio-vortaro, M. Westermayer (1947-). Tübingen: La aŭtoro, 1982. 75p. Mimeo. 21cm. ISBN 3 923596 12 X. Faka vortaro en la lingvoj angla, Esperanta kaj germana. Prezo: 15,60 guldenoj.

Krestomatio de Esperanta literaturo; Tekstoj, dataro, bibliografio, vol. II, István Szerdahelyi (1924-). Budapest: Tankönyvkiadó, 1981. 326p. Ilus. Mimeo. 24cm. Universitata lernolibro, kiu traktas la Esperantan literaturon en Hungario, Aŭstrio, Germanio kaj Skandinavio. Prezo: 18,00 gld.

Lappar, la antikristo; Originalaj noveloj, Endre Tóth (1931-1981). Budapest: Hungara Esperanto-Asocio, 1982. 139p. 19cm. ISBN 963 571 048 8. Dek kvin rakontoj, kiujn distingas bonaj observokapablo, analizo de modernaj temoj kaj eleganta stilo. Prezo: 13,80 guldenoj.

Leksikono, J. P. Bovy. Hertsal: Association pour l'Espéranto, 1982. 105p. Mimeo. 21cm. Vortaro en kvin lingvoj: Esperanto, franca, angla, nederlanda kaj germana. Ĉirkaŭ 4 500 E-radikoj. Prezo: 17,40 guldenoj.

Makedona antologio. Elektis Koce Solunski kaj Metodi Galeski. Red. M. Galeski. Diversaj tradukintoj. Prilep: Esperanto-societo "La Progreso", 1981. 154p. 20cm. Kolekto de 48 reprezentaj verkoj (prozaj kaj poeziaj) el unu el la plej junaj eŭropaj literaturoj. Prezo: 15,00 guldenoj.

Medicino dum 1300-jara historio de Bulgario, La. Red. K. Popov kaj M. Apostolov. Sofio: BEA, 1981. 96p. Ilus. Mimeo. 20cm. Prezo: 8,40 guldenoj.

Metodiko en la praktiko. Red. Zsuzsa Barcsay. Paderborn/Budapest: Esperanto-Centro Paderborn kaj Hungara Esperanto-Asocio, 1982. 122p. 21cm. ISBN 3 922570 34 8. Kolekto de studoj de pluraj aŭtoroj (Ragnarsson, Bormann, Szerdahelyi, Dahlenburg, Piron k.a.) pri instruado en diversaj medioj laŭ diversaj metodoj. Enestis dokumento pri la stato de E-instruado (G. Pirlot). Prezo: 14,70 guldenoj.

Metodologio de lingvoinstruado kaj parolalproprigo (1975), István Szerdahelyi (1924-). Budapest: Tankönyvkiadó, 1981 (represo). 326p. Mimeo. 24cm. Universitata lernolibro, kun historia skizo pri Esperanto en lernejoj. Multaj tabeloj, ampleksa bibliografio. Prezo: 18,00 gld.

Mikroprocesoro INTEL 8080, La. El la angla trad. Christian Bertin. Rennes: La tradukinto, 1982. 77p. Mimeo. 30cm. Tri ĉapitroj el usona manlibro pri tiu mikroprocesoro. Prezo: 10,80 guldenoj.

Nova testamento de nia Sinjoro kaj Savanto Jesuo Kristo, La. Londono: Brita kaj Alilanda Biblia Societo, 1982. 225p. 20cm. Bindita. ISBN 0 564 02038 9. Prezo: 7,50 gld.

Paroladoj de L. L. Zamenhof. Trad. en la ĉinan Zhu Mingyi. Pekino: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1982. 176p. 19cm. Du-lingva eldono (Esperanta-ĉina) de 17 paroladoj. Prezo: 9,00 gld.

Pika! en Hiroŝima (1980), Toŝi Maruki. El la japana trad. J. Narita. Tokio: La tradukinto, 1982. 48+9p. Ilus. 21cm. Bindita. Japanlingva kolora bildlibro kun E-traduko en aparta kajereto. Prezo: 25,80 gld.

Raporto de la Centra Komitato de Bulgara komunista partio antaŭ la 12a kongreso kaj la antaŭstarantaj taskoj de la partio kaj Parolado ĉe la fermo de la 12a kongreso de Bulgara komunista partio, Todor Jivkov. Sofia-Pres, 1981. 107p. 20cm. Prezo: 3,00 gld.

Schleyer: Johann Martin Schleyer (1831-1912) aŭtoro de la planlingvo Volapük; Festprelego okaze de lia 150a naskiĝtago, Reinhard Haupenthal (1945-). Saarbrücken: Artur E. Iltis, 1982. 35p. Mimeo. 21cm. Germana kaj Esperanta tekstoj. Prezo: 11,10 guldenoj.

Sentimulo, La, J. F. Cooper (1789-1851). Reverkis Roger Imbert. Zagreb: Internacia Kultura Servo, 1982. 69p. 20cm. Facila Esperanto 1. Aventura romaneto rerakontita per ĉ. 450 radikoj plej ofte uzataj en baza lernolibro de Esperanto. Prezo: 9,00 guldenoj.

Ses esplorcentroj pri interlingvoj, Cornelius J. McKown. Rotterdam: UEA, 1981. 8p. 21cm. ED-15E. Informoj pri Esperantaj kolektoj en Londono, Vieno, Roterdamo, Kortrijk (Belgio), Szeged (Hungario) kaj Budapeŝto. Prezo: 3,00 gld.

Sferoj - 1; Sciencfikcio kaj fantasto, diversaj aŭtoroj. Pluraj tradukintoj el div. lingvoj. Kompilis M. Gutierrez Aduris. Zaragoza: Eldona Fakto de HEF, 1982. 131p. Ilus. 19cm. ISBN 600 2667 1. Naŭ sciencfikciaj rakontoj, kelkaj de famaj aŭtoroj kaj tradukintoj. Bela grafika prezento. Prezo: 21,00 gld.

Skiza historio pri la lino, A. da Silva. El la portugala trad. V. Mendes. Porto: Portugala Eldona Rondo, 1982. 23p. Ilus. Mimeo. 21cm. Prezo: 1,20 guldenoj.

Studenti i Esperanto. Red. F. Šehanović. Sarajevo: Univerziteti Esperanto Klub, 1982. 65p. 20cm. Informa broŝuro pri Esperanto en la studenta medio. Artikoloj tradukitaj kaj originalaj. Prezo: 9,00 guldenoj.

Surgrimpito en Himalajo, A. da Silva. El la portugala trad. M. de Freitas. Porto: Portugala Eldona Rondo, 1982. 16p. Mimeo. 21cm. Kulturklerigaj kajeroj n-ro 10. Prezo: 1,20 gld.

Sur la du frontoj; Kontribuo al la historio de la ĉeĥa klasbatala Esperanto-movado. Kompilis Jaroslav Klement k.a. Prago: Ĉeĥa Esperanto-Asocio, 1981. 31p. Ilus. 20cm. Prezo: 1,50 gld.

Taschenwörterbuch Deutsch-Esperanto (1971), Erich-Dieter Krause. Leipzig: VEB Verlag Enzyklopädie, 1981 (3a eldono). 279p. 13cm. 12 000 vortoj. Prezo: 9,00 gld.

Taschenwörterbuch Esperanto-Deutsch (1967), Erich-Dieter Krause. Leipzig: VEB Verlag Enzyklopädie, 1981 (4a eldono). 190p. 14cm. 12 000 vortoj. Prezo: 7,20 gld.



Ticiano: Vivo kaj arto de Ticiano, A. da Silva. El la portugala trad. M. de Freitas. Porto: Portugala Eldona Rondo, 1982. 19p. Ilus. Mimeo. 21cm. Prezo: 1,20 guldenoj.

Tito pri Esperanto. Sarajevo: Universitata Esperanto-Klubo, 1982. 8p. 16cm. Ses eldiroj de Tito pri la Internacia Lingvo. Prezo: 1,50 guldenoj.

Restas loko por vi

Tio estas la ĉefa mesaĝo de bela dukolora afiŝo, kiu aperis sur la du mezaj paĝoj de unu el la lastaj numeroj de "Kontakto". La afiŝo, kies formato estas 28,5x420mm, estas presita ank-aŭ aparte kaj ĝi haveblas ĉe la Libroservo de UEA. Prezo: 12,00 guldenoj (plus sendokostoj) por 10 ekzempleroj (minimuma mendokvanto). Ĉe samtempa mendo de 30 ekzempleroj, oni ĝuas trionan rabaton.

La afiŝo prezentas gajan grupon da gejunuloj. Ne mankas tie ankaŭ la grandliteraj vortoj: ESPERANTO — Internacia Lingvo. Restas loko por alĝui nacilingvan tradukon de la ĉefa mesaĝo, kiu haveblas (sen kroma pago) en la angla, franca, germana, itala kaj nederlanda. Plia loko estas antaŭvidita por enskribi informojn pri viaj propraj kursoj, kunvenoj ktp.



Trans la son-izolan muron; Pri kontaktoj kun surduloj. Div. aŭtoroj. El la nederlanda. Antverpeno: Flandra Esperanto-Ligo, 1981. 36p. Ilus. 17cm. Prezo: 2,70 gld.

Verkoj de Verda Majo, Verda Majo (pseŭd. de Teru Hasegawa, 1912-1947). Pekino: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1982. 501p. Ilus. 21cm. Bindita. Pli ol kvindek artikoloj pri travivaĵoj en Japanio kaj Ĉinio dum malfacilaj militaj jaroj. Ankaŭ pri la Esperanta agado de tiu fama esperantistino kaj revoluciulo. Prezo: 19,80 guldenoj.

Vortareto Esperanto-malagasa, Rakotondravao. Roterdamo: UEA, 1982. 39p. Mimeo. 21cm. Prezo: 5,10 gld.

Vortlibro kun krokizo de gramatiko Esperanta; Syam Sundar Pal. Calcutta: Federacio Esperanto de Bharato, 1982. 162p. 23cm. Trilingva laŭtema vortareto pri 50 fakoj, en la angla, bengala kaj Esperanto. Prezo: 12,00 gld.

Diversaĵoj

Esperanto kaj libereco. Tekstoj de Max Roy Carrouges; Muziko de T. Turens. Paris: Arion, 1982. ARN 34666. Duflanka, stereofona disko kun Esperanta teksto. 30cm. 33t/m. Orkestron direktas Jean-Claude Passaga. Kantas M.R. Carrouges. Bele eldonita grandformata disko kun 12 originalaj kantoj. Prezo: 27,90 gld.

Floreto. Kantas kaj gitarludas Feri Floro (pseŭd.). Bad Soden-Taunus: 1982. Kaseto stereofona. Kun tekstfolio de dek kantoj, diversnaciaj. Bela tenora voĉo. Prezo: 18,00 gld.

Israelo kantas. Prezentas Chantal, akompanas K. Štern. Tel-Aviv: JELI, 1982. Kaseto stereofona, 40-minuta. Kun tekstolibro (16p. Ilus. 22cm). Dek kvar modernaj kaj malnovaj israelaj kantoj. Prezo: 18,00 guldenoj.

Papageno kaj du grandaj arioj. Kantas Agathe Soemer-Pascali (soprano) kaj Veselin Damjanov (baritono). Paderborn: Esperanto-Centro, 1982. 17,5cm. Duflanka disko kun Esperanta teksto. Arioj el *La geedziĝo de Figaro* kaj *La magia fluto* de Mozart kaj *La barbiro de Seviljo* de Rossini. Pianakompanas N. Soemer. Prezo: 11,40 guldenoj.

MENDU ĈE LA LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Bonvolu atenti, ke al ĉiuj netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Nederlando aldoniĝas 4, kaj al tiuj de diskoj, insiginoj k.s. 18 procentoj por la enlanda imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas sendokostoj: por la mendoj sub la valoro de 200 guldenoj — 20 procentoj, por la mendoj super 200 guldenoj — 10 procentoj. Minimumaj sendokostoj estas 5,00 gld. Antaŭdankon pro via mendo!

Ĉi tiun rubrikon prizorgas: **PAUL S. HOPKINS**, 45 Mission Street, Kitchener, Ontario, Kanado N2H 2J5.

SEMINARIO EN SZENTENDRE:

Homaj loĝlokoj — hodiaŭ kaj morgaŭ

MEZE DE AŬGUSTO, de la 15a ĝis la 22a, en la hungara urbeto Szentendre, ĉe Budapeŝto, disvolviĝis la seminario pri "Homaj loĝlokoj — hodiaŭ kaj morgaŭ", organizita kunlabore inter Komisiono pri Eksteraj Rilatoj (KER) de TEJO kaj Interfaka Scienca Studenta Rondo (ITDK, laŭ la hungarlingva mallongigo). Dum la semina semajno, ĉ. 150 partoprenantoj el dekkvino da landoj (inter kiuj Brazilo, Pollando, Usono, ambaŭ Germanioj ktp) aŭdis kelkdekon da prelegoj, vidis plurajn filmojn, ĉeestis diskutgrupojn kaj publikajn debatojn, spertis "kreivan laboratorion", vizitis artajn kaj etnografiajn muzeojn, kaj konatiĝis kun Budapeŝto dum la nacia festotago de Hungario (la 20a de aŭgusto).

La prelegoj okazis en moderna kulturdomo kaj, foje, en la urbodomo. Ĉiuj prelegoj estis samtempe tradukitaj en aliajn lingvojn: oni uzis la hungaran, Esperanton, la anglan kaj (foje) la germanan. Inter la plej elstaraj prelegoj oni devas mencii tiujn de György Kepes, hungaro loĝanta en Usono, pri "Arto en urba ĉirkaŭaĵo", pri la rilatoj inter arto kaj loĝejaj kompleksoj,



Preleganto restis en varma salono, kaj la publiko migris al la ĝardeno freŝo: Partoprenantoj de la Seminario aŭskultas la interpretadon de unu el la prelegoj en Szentendre.

cele al homa dimensio de la urboj; kaj tiun de la okcidentgermano Horst Heinicke, pri "Partopreno en la planado kaj en la realigo", pri la efektiva kontribuo de la loĝontoj en la planado de densiĝo, medio, trafiko, energio, infrastrukturoj, provizado en iu kvartalo aŭ pli granda loĝunuoj. Ambaŭ prelegoj, samkiel pluraj aliaj, estis ilustritaj per trafikaj lumbildoj. Tre interesa estis ankaŭ la prelego de la socipsikologo usona Elliot Aronson, pri "Esploro de novaj edukaj metodoj instigantaj la pozitivan konduton rilate al la socio kaj malkreskigantaj la antaŭjuĝojn".

En la semajno antaŭ la seminario, ITDK organizis mediprotektadan labortendaron en la ĉirkaŭaĵo de Szentendre, pri kies rezultoj oni raportis al la seminarianoj. Ĝuste en la plureco de la prelegoj, aŭ pli bone de ties temoj, kuŝas unu el la verdire malmultaj malvirtetoj de la seminario. Estis, fakte, sufiĉe malfacile por nefakuloj elturniĝi inter la pluraj, ne perfekte koherigitaj prelegoj; la temo rezultis esti ne tro klare ilustrita, kaj ofte oni rimarkis tre la amatorecon de la prelegintoj kaj (sed tio estas tute alia flanko de la problemo) de la tradukintoj. Amatorecon (iasence) oni rimarkis ankaŭ ĉe la hungaraj organizantoj, certe troŝarĝitaj de laboro, sed, same certe, ne tro emaj informi kaj helpi la nehungarajn partoprenintojn. Tamen, kelkajn malglataĵojn oni ĉiam devas atendi ĉe kiu ajn aranĝo, ne nur esperantista.

Dum la seminario okazis, kiel oni povas supozi, kunsido de KER, kiun partoprenis deko da homoj sub la prezidado de la nova TEJO-estrarano pri eksteraj rilatoj, Martin Haase. Oni diskutis pri pluraj flankoj de la agado de KER, de la financo ĝis la reprezentigo ĉe mondskalaj konferencoj kaj organizaĵoj, kaj oni donis apartan atenton al la planoj por Internacia Jaro de la Junularo en 1985. La kunsidon partoprenis ankaŭ la TEJO-komisiito por la Jaro, t.e. la aŭtoro de tiu ĉi artikolo.

Kvin interesitoj vizitis, la 19an de aŭgusto, la sidejon de la Monda Federacio de Demokrata Junularo (MFDJ) en Budapeŝto. Temis pri renkontiĝo, kies celo estis plibonigi la rilatojn inter la du organizaĵoj, per rekta interŝanĝo de ideoj, planoj, spertoj; por TEJO ĉeestis M. Haase (FR Germanio), Neven Kovačić (Jugoslavio), Michael Lennartz (Germana DR), Norberto Saletti (Italio) kaj Elisabeth Schwarzer (FR Germanio). La renkontiĝo estis tre fruktodona, kaj la interŝanĝo de ideoj tre vigla.

Konklude, oni povas diri ke ankaŭ tiu ĉi seminario eniros la historion de KER, kun ĉiuj siaj virtoj (multaj) kaj malvirtoj (bonŝance malmultaj). Ĉiam estas efika kaj taŭga varbargumento montri la flekseblecon, la utiligeblecon de nia lingvo por diskuti pri ĉio, sciencnivele, en internacia medio. Pluraj novaj seminarioj, planataj de KER, havos aliajn — ofte nelingvajn — temojn, kaj certe tre efike kontribuos al la multiĝo de la konsideroj pri Esperanto fare de sciencistoj kaj aliaj fakuloj. Ankaŭ tra tio iras la vojo al la akcepto de Esperanto fare de la ekstera mondo.

Norberto Saletti

FUJIO EGAMI (1910-1982), prezidanto de Japana Esperanto-Instituto kaj membro de Honora Patrona Komitato de UEA, forpasis en Tokio la 17an de julio ĉi-jare. Li estis monde konata biokemiisto, specialisto pri la molekula biologio. Jam inter la du mondmilitoj, Egami studis en



Eŭropo kaj utiligis Esperanton tiucele. Li profesoris en la universitatoj de Nagojo kaj Tokio, prezidis (1969-1972) Japanan Sciencan Konsilantaron kaj havis plurajn aliajn elstarajn funkciojn en- kaj eksterlande. En Japana Esperanto-Instituto, Egami fariĝis direktoro en 1961, ĉefdirektoro en 1967, kaj prezidanto en 1977. Per lia forpaso la Internacia Lingvo perdis unu el siaj plej eminentaj adeptoj kaj la japana Esperanto-movado sian multjaran gvidanton.

ADOLF HOLZHAUS (1892-1982), unu el la plej verve aktivintaj zamenhofologoj en la lastaj jardekoj, mortis en Columbus (Usono), la 9an de junio 1982. Estas nun malfacile ĉi tie listi la tutan amplekson de la verkaro de Holzhaus, kiu verkis, redaktis, tradukis, kompilis kaj eldonis i.a. jenon: *Doktoro kaj lingvo Esperanto* (1970), *Granda galerio zamenhofa* (du volumoj: 1973, 1978), *Zamenhof: Leteroj* (1975), *Proverboj de M. Zamenhof kaj de L. Zamenhof* (1980), *Provo de gramatiko de novjuda lingvo* (1982) ktp. Holzhaus verkis ankaŭ pri Marko Zamenhof kaj pri W.H. Trompeter. Kvankam foje ne tute poluritaj, la verkoj de Holzhaus prezentas grandegan valoron por la estontaj zamenhofologoj kaj movadaj historiistoj.

HIDEMITI OKA (1902-1982), profesoro pri zoologio, rektoro de Internacia Somera Universitato dum la 50a UK en Tokio en 1965, forpasis la 16an de junio ĉi-jare. Li prelegis ankaŭ en aliaj sesioj de ISU kaj estis unu el la kontribuintoj al la faka volumo *Sciencaj studoj* (1958). D-ro Oka estis eminenta sciencisto, kiu i.a. prezidis Japanan Zoologian Societon kaj estris sciencan fakultaton en la Universitato de Tokio. Li estis esperantisto dum multaj jardekoj.

LI UNSANG (1903-1982), la plej fama korea poeto dum la lastaj jardekoj, forpasis la 18an de septembro 1982. En 1976 aperis Esperanta traduko de kelkaj el liaj verkoj sub la titolo *Elektitaj siĝoj de Nosan*. De 1963 ĝis 1975 li estis prezidanto de Korea Esperanto-Societo.

ŽELJKO TAKAČ (1927-1982), ĵurnalisto kaj verkisto, forpasis en Zagrebo (Jugoslavio). Li lernis Esperanton en 1947, gvidis multajn kursojn, faris grandan prelegvojaĝon tra Norvegio (kies honorkonsulo li estis) kaj ofte verkis nacilingve pri Esperanto. Unu el liaj rakontoj enestas la antologion *Tridek tri rakontoj* (1964).

Loke

Irano

- Ne atingis nin lastatempe multaj raportoj pri la stato de la Movado en Irano. Tamen, ŝajnas ke kelkaj E-kursoj okazas tie. Krome, venis dum la lastaj monatoj du libroj, kies eldono sugestas, ke la agado por Esperanto en tiu lando restas vigla. Temas pri ampleksa *Persa-Esperanta vortaro* (preskaŭ 40 000 vortoj) de Badiollah Samimy, unu el la plej malnovaj iranaj esperantistoj, kaj pri la 2a eldono de la alidirekta *Esperanto-persa vortaro* de Mahmud Moŝkeri.

Ĉilio

- José A. Vergara, juna studento pri medicino, starigas universitatan Esperanto-rondon en Valdivia, urbo situanta 800km sude de Santiago. En la Filozofia Fakultato de la tiea

Suda Universitato, antaŭ kelka tempo okazis prelego pri la Internacia Lingvo. En la multnombra publiko troviĝis gestudentoj kaj profesoroj. La preleganto estis Alfonso Toloza, kiun prezentis la estro de la Fakultato, Mauricio Pilleux.


Nov-Zelando

- Laŭ unu el la lastaj numeroj de *Nov-zelanda esperantisto*, ankaŭ en tiu lando (simile kiel en Britio kaj Kanado) okazas senpaga korespondakurso de Esperanto. La kurson partoprenas pli ol 50 gestudentoj.

Soveta Unio

- Meze de julio en Estonio okazis seminario "Esperanto kaj la naturo", inter kies prelegantoj estis ankaŭ F. Nimsalu, vicministro en la estona registaro. Partoprenis ĉ. 60 geespe-

- Bulgario:** La 25an kaj la 26an de septembro ĉi-jare, en Veliko Tarnovo, kie en 1978 okazis TEJO-kongreso, Bulgara Esperantista Asocio festis 75 jarojn de post sia fondiĝo. La jubileo estis markita i.a. per scienca konferenco en la Universitato de Veliko Tarnovo kaj per instalo de memortabulo sur la naskiĝdomo de Ĥristo Popov, pioniro de la bulgara E-movado. En tiu domo, en la apuda vilaĝo Dolna Orjahovica, estis aranĝita ekspozicio de historiaĵoj. Nome de UEA la jubilean feston ĉeestis d-ro Renato Corsetti, vicprezidanto de la Asocio.



rantistoj el diversaj partoj de la lando. Pli frue (en majo), la estona ĉefurbo Tallinn gastigis sciencan E-konferencon, kiu traktis biologiajn kaj ekologiajn temojn.

- Okdek gejunuloj, kiuj lernas Esperanton, partoprenis en julio 5-tagan renkontiĝon, kies kostojn kovris sindikata organizaĵo.

Usono

- En la jarkunvenoj de Modernlingva Asocio de Usono, jam delonge Esperanto estas ofta temo. La ĉi-jara kunveno, kiu okazos de la 27a ĝis la 30a de decembro en Los Angeles (Hilton Hotel, 930 Wilshire Blvd), enhavos ankaŭ sesion sub la titolo "Esperanto kiel enkonduko al lingvistudado". La sesion prezidos Dorothy Holland; la prelegantoj estos d-ro Robert Blair kaj Arthur Eikenberry.

Vjetnamio

- En la ĉeesto de kelkcento da esperantistoj kaj gastoj, antaŭ kelkaj monatoj en la urbo Hochiminh



refondiĝis Esperanto-klubo. Inter la ĉefparolantoj en la fondkunveno estis la konata vjetnama verkisto N. H. Trùng, vicprezidanto de la Vjetnama Pacdefenda Esperantista Asocio. N.H. Trùng (sur la foto) lastatempe faris multnombrajn prelegojn pri Esperanto antaŭ miloj kaj miloj da laboristoj, intelektuloj kaj gejunuloj. En la urbo Hochiminh nun okazas du grandaj Esperanto-kursoj.

ŝajnas, ke tiu manko baldaŭ malaperos: jam de kelkaj jaroj oni en Japanio, helpe de nemovada institucio, prilaboras Esperantan tradukon de ampleksa budhisma libro, iaspeca ekvivalento de la kristana *Sankta Biblio* kaj islama *Nobla Korano*. La verko (de pluraj tradukintoj) jam estas en la stato de presprovaĵoj, kaj oni atendas ĝian aperon en la unuaj monatoj de 1983.

Virinoj

- Kiel konate, la Esperanta bulteno *Sekso kaj egaleco* havas ankaŭ japanlingvan eldonon, kiu fariĝas ĉiam pli populara en tiu lando. La eldonantoj de la japana versio planas por la fino de ĉi tiu jaro apartan Esperanto-kurson por la japaninoj, kiuj ŝatus per Esperanto korespondi kaj partopreni la internacian virinan movadon. Tiucele oni nun serĉas korespondantinojn el aliaj landoj. Skribu (kun kiel eble pli da detaloj) al: Setuko Yamakawa, 1-3-4 Soka, Soka-si, Saitama-ken, 340 Japanio.

Tradukoj

- Ankaŭ ĉi-jare okazis traduka konkurso en Francio. Pro tradukoj el la franca en Esperanton, la premiojn gajnis: J. Vincent (*La lasta vespero* de R. Bazin), C. Boumal (*Rigardoj sur la aktuala mondo* de P. Valéry) kaj J. Gonin (*Rakonto pri la paroĥestro...* de H. Pourrat). Pro tradukoj de Esperantaj verkoj en la francan, la premioj iris al: C. Boumal (*Vivo kaj opinioj de Majstro M'Saud* de J. Ribillard) kaj L. Marin (*En la puto* de T. Tyblewski). Jam estas anoncita la venontjara konkurso pri kiu informas la sekretario: Hervé Gonin, 9 rue de l'Enclos, F-59151 Arleux.

Fake

Interlingvistiko

- *Osnovy interlingvistiki* (Fundamentoj de interlingvistiko) estas la titolo de nova ruslingva verko de Sergej Kuznecov, kunlaboranto de la Lingvosciencia Instituto de la Akademio de Sciencoj de Soveta Unio. La 108-paĝa verko estas universitata gvidlibro, kiu amplekse traktas pri Volapuko kaj Esperanto.

Pro limigita eldonkvanto la verko ne estas akirebla en la merkato.

Budhismo

- Diference de la kristanismo kaj islamo, kiuj jam de longe prezentigis per siaj bazaj verkoj en Esperanto, budhismo ĝis nun povis proponi en la Internacia Lingvo nur iom da pli-malpli hazardaj broŝuroj. Nun



Kníchal

- Pro administra eraro, en la komuniko pri la rezultoj de la ĉi-jaraj Belartaj Konkursoj mankis la nomo de Oldřich Kníchal (Hungario), kies poemo *Lando promesita* gajnis laŭdan mencion. Kníchal antaŭ kelkaj jaroj kunaŭtoris la premiitan romanon *Kiuj semas plorante...*, kiu devus baldaŭ aperi ĉe UEA kaj kiun oni en Kanado tradukas en la anglan. Kníchal nun tradukas la faman verkon de J. Hašek *La brava soldato Ŝvejk*.

Simonnet

- Francisko Simonnet, internacie konata franca aktivulo kaj antaŭe komitatano de UEA, ĵus akceptis la postenon de instruisto pri la franca lingvo en la Universitato de Aleksandrio (Egiptio). Li planas resti tie "iom longe" kaj i.a. servi en la delegita reto de UEA. Sendube, s-ro Simonnet kontribuos al la jam jardekojn longa klopodo starigi Esperanto-movadon en Egiptio.

van Wijngaarden

- La 1-an de septembro ĉi-jare, en la Centra Oficejo de UEA okazis eta festo pro nekutima kialo. Tiam Sija van Wijngaarden festis 25 jarojn da seninterrompa laboro kiel oficistino de UEA. Ŝi do eklaboris en la Centra Oficejo la 1-an de septembro 1957, du jarojn post la translokiĝo de la asocia sidejo al Nederlando.



Nun, same kiel en la komenco, ŝi prizorgas ĉefe la membroadministradon kaj la diversajn adresarojn. Ĝuste Sija pleje rimarkas la revolu-

cion, kiu intertempe okazis en la administrado: iam ŝia laboro similis al tiu de presisto (kun nigra inko kaj adreskliŝoj), kaj nun ŝi faras la tutan laboron sidante ĉe komputila ekrano. Kiam Sija pensiigos post tri jaroj, ŝi estos la unua pensiulo, kiu pasigis la plimulton de sia laborvivo en la roterdama oficejo de UEA.

Kawasaki

- Prof. Naokazu Kawasaki, akademiano kaj konata japana esperantologo, denove vojaĝis al Ĉinio (fine de aŭgusto), kiel li faris ankaŭ en la pasintaj du jaroj. Li skribas, ke en la urboj Kunming kaj Guangzhou (Kanton) pluraj lokaj esperantistoj kontaktis lin. Prof. Kawasaki kun intereso notis, ke kelkaj el la esperantistoj en Kunming apartenas al la naciaj minoritatoj de Ĉinio. Kun prof. Kawasaki vojaĝis s-inoj Ozawa kaj Mizumoto, el kiuj la unua estas fratino, kaj la dua amikino de la fama japana/ĉina esperantistino Hasegawa Teru (1912-1947) — Verda Majo, kies 500-paĝa verkaro ĵus aperis ĉe Ĉina Esperanto-Eldonejo.

Oficiale Informilo

N-ro 556

NOVAJ ĈEFDELEGITOJ EN ARGENTINO KAJ NOV-ZELANDO

Argentino havas novan ĉefdelegiton kaj kotizperanton: f-ino M. Solís, Tucumán 50, RA-2600 Venado Tuerto (S. Fé). Ni kore dankas al la

antaŭa ĉefdelegito, s-ro H. Lingua, kiu per aparte energia varbado altigis la nombron de individuaj membroj en Argentino de 67 en 1979 al 137 en 1981.

Post la forpaso de la ĝisnuna ĉefdelegito en Nov-Zelando, s-ro J.T. Allan (pri kiu vi trovos nekrologon en ĉi tiu revuo), kiel la nova ĉefdelegito en tiu lando estas nomita s-ro F.E. Wood, 24 Stewart Road, Mount Albert, Auckland 3.

NOVAJ ADRESOJ DE AŬSTRA KAJ HISPANA KOTIZPERANTOJ

S-ro E. Majtanić, Breitenfurterstr. 487/2/2, A-1236 Wien, Aŭstrio.
S-ro J. Azcuénaga Vierna, General Dávila 127, portal 7, 2° izda, Santander, Hispanio.

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Belgio: B. Venhuizen; G. Jacques.
Usono: Billy Waldon; Sequoyah F. Waldon.

SOCIETO ZAMENHOF 1982

Belgio: André Degryse. Francio: Roland Jossinet. Japanio: Wilhelm

Ekzistas loko por

sekretari(in)o

en la Centra Oficejo de UEA en Roterdamo. Estas bezonataj bona scipovo de Esperanto (precipe skribe) kaj rapida tajpkapablo. Oni devas esti preta tajpi leterojn laŭ diktomaŝino kaj mem verki leterojn laŭ koncizaj instrukcioj. Iom da laboro en aliaj oficejaj fakoj estas antaŭvidebla; sperto pri grafika laboro kaj ĝenerala administrado estas dezirinda.

La salajro estas interkonsentota, depende de sperto. Ni unuavice serĉas oficist(in)on por plurjara deĵorado, sed konsideros ankaŭ kandidatojn en la kadro de la Volontula Servo. En tiu kazo, kandidatoj devas esti minimume 18-jaraj, kaj maksimume 29-jaraj, kun servoperiodo de unu jaro, kaj pago de restadkosto (loĝado, manĝado), asekuro kaj, eventuale, parto de la vojaĝkosto.

Deĵoro ekde la komenco de 1983. Petu demandaron de la CO.

Schmid; Oomoto. Norvegio: Rolf Bugge-Paulsen. Usono: William W. Glenny.

Entute ĝis nun 196 membroj.

DONACOJ 1982 (Gld.)

ĝis la 11a de oktobro

CENTRO DE ESPLORO KAJ DOKUMENTADO: Nederlando: H.H. Weulen Kranenberg 100,00. Sumo ĉi-jara 140,80.

FONDAĴO AZIO-AFRIKO: Belgio: G. Pirlot 23,16; J. Verstraeten 55,56. Italio: R. Clerici 11,10. Nederlando: H. Bakker (patro) 25,00; I.M.J. Dijkhoff-Lenze 100,00; A.J. Middelkoop 50,00; R. Moerbeek 50,00; W.P. Roelofs 58,75; R. Vetter 100,00; H.H. Weulen Kranenberg 100,00; B. de Wit 10,00. Nikaragvo: Julie Regal 67,18. Norvegio: M. Landmark 305,56. Svedio: A. Nilsson 36,00; E. Mustea 44,00. Sumo ĉi-jara 2 769,77.

FONDAĴO CANUTO: Nederlando: A.J. Middelkoop 50,00. Aŭkcio en la 67a UK en Antverpeno 2428,90. Sumo ĉi-jara 4768,40.

FONDAĴO SCIENCO KAJ TEKNIKO: Nederlando: R. Moerbeek 100,00. Sumo ĉi-jara 100,00.

FONDAĴO KER DE TEJO: Eŭropa Konsilantaro 19 036,80. Sumo ĉi-jara 19 335,95.

ĜENERALA KASO: Britio: C.A. Field 22,25. Kanado: W.D.B. Hackett 41,05. Nederlando: H.H. Weulen Kranenberg 100,00. Norvegio: K. Gustavsens 19,04. Finnlando: Pauli Riihivaara 14,40. Sumo ĉi-jara 2 196,12.

PATRONOJ DE TEJO: 49 Y. Tacumi, Japanio. 50 W.P. Roelofs, Nederlando. 51 J. Calado, Nederlando. 52 J.L. Texier, Francio. 53 R. Clerici, Italio. 54 I. Tautorat, FR Germanio. 55 H. Tautorat, FR Germanio. 56 E. Burg, Nederlando. 57 W. Derks, Nederlando. 58 G. Silber, Svislando. 59 H.B. Snel, Nederlando.

PROPAGANDA KASO: Nederlando: Van der Teems 40,00. Sumo ĉi-jara 114,32.

AGADO ĈE UN KAJ UNESKO: FR Germanio: R. Paintner-Trumpp 327,00; R. Wiegand 55,56. Sud-Afriko: M.E. Dickson 11,10. Div. malgrandaj: 11,12. Sumo ĉi-jara 404,78.

BUDAPEŝTA OFICEJO: FR Germanio: R. Paintner-Trumpp 4406,80.

Al ĉiuj tre koran dankon!

UEA

Kotiztabelo por 1983

Lando/Valuto	(J-)AM	MJ(-K)	MA(-K)	SA	Kto	SZ
Argentino/peso*	17200	344000	860000	516000	258000	1720000
Aŭstralio/dolaro	0,50	10	25	15,00	7,50	50
Aŭstrio/ŝilingo	7,50	150	375	225	112,50	750
Belgio/franko	24	480	1200	720	360	2400
Brazilo/kruzejro *	64	1280	3200	1920	960	6400
Britio/pundo	0,25	5,00	12,50	7,50	3,75	25,00
Bulgario/guldeno	0,85	17,00	42,50	25,50	12,75	85,00
Ĉeĥoslovakio/krono	6,50	130,00	325,00	195,00	97,50	650,00
Ĉilio/peso	20	400	1000	600	300	2000
Ĉinio/guldeno	0,75	15,00	37,50	22,50	11,25	75,00
Danlando/krono	4,50	90	225	135	67,50	450
Finnlando/marko	2,20	44	110	66	33	220
Francio/franko	3,50	70	175	105	52,50	350
FR Germanio/marko	1,20	24	60	36	18	120
Germana DR/guld.	1,10	22,00	55,00	33,00	16,50	110,00
Greklando/draĥmo	22	440	1100	660	330	2200
Hinda Unio/rupio	2,40	48	120	72	36	240
Hispanio/peseto	40	800	2000	1200	600	4000
Hungario/forinto	12,50	250	625	375	187,50	1250
Irano/guldeno	0,80	16	40	24	12	80
Irlando/pundo	0,25	5,00	12,50	7,50	3,75	25,00
Islando/krono	8,00	160	400	240	120	800
Israelo/siklo*	12	240	600	360	180	1200
Italio/liro	550	11000	27500	16500	8250	55000
Japanio/eno	105	2100	5250	3150	1575	10500
Jugoslavio/dinaro	16	320	800	480	240	1600
Kanado/dolaro	0,68	13,60	34,00	20,40	10,20	68,00
Kolombio/peso	18	360	900	540	270	1800
Korea Resp./ŭono	230	4600	11500	6900	3450	23000
Luksemburgo/franko	24	480	1200	720	360	2400
Meksikio/peso *	40	800	2000	1200	600	4000
Nederlando/guldeno	1,25	25,00	62,50	39,00	19,50	125,00
Norvegio/krono	3,40	68,00	170,00	102,00	51,00	340,00
Nov-Zelando/dolaro	0,58	11,60	29,00	17,40	8,70	58,00
Peruo/guldeno	0,75	15,00	37,50	22,50	11,25	75,00
Pollando/guldeno	0,90	18,00	45,00	27,00	13,50	90,00
Portugalia/eskudo	25	500	1250	750	375	2500
Soveta Unio/guld.	0,95	19,00	47,50	28,50	14,25	95,00
Sud-Afriko/rando	0,45	9,00	22,50	13,50	6,75	45,00
Svedio/krono	3,80	76,00	190,00	114,00	57,00	380,00
Svislando/franko	1,10	22	55	33	16,50	110
Urugvajo/peso	4	80	200	120	60	400
Usono/dolaro	0,60	12	30	18	9	60
Venezuelo/bolivaro	1,70	34	85	51	25,50	170

ALIAJ LANDOJ: Laŭ pola tarifo: Hongkongo, Malto, Singapuro. Laŭ irana tarifo: Alĝerio, Irako, Jamaiko, Kostariko, Kubo, Libano, Maŭricio, Panamo, Portoriko, Rumanio, Svazilando, Turkio, Nederlandaj Antiloj. Laŭ ĉina tarifo: ĉiuj ceteraj landoj ne jam menciitaj. Por ĉiu validas la tarifo de la nuna loĝlando. Ĉiuj kotizoj supre menciitaj validas por la kalendara jaro.

(J-)AM = (Juna) Asocia aŭ Aligita Membro (koncernas nur landajn asociojn)
 MJ(-K) = Individua Membro kun Jarlibro (kaj ĝis inkl. 25 jaroj, *Kontakto*)
 MA(-K) = Individua Membro-Abonanto (kiel MJ(-K), plus revuo *Esperanto*)
 SA = Simpla Abono de la revuo *Esperanto*, sen membreco en UEA
 Kto = Abono al la revuo *Kontakto*, sen membreco en TEJO
 SZ = Kotizo por Societo Zamenhof (ne inkluzivas membrecon en UEA)

* La tarifo validas nur por pagoj faritaj ĝis la fino de 1982! Posta tarifo anoncota.

Tarifo: Ĉiu vorto kostas 0,90 guldenojn (unu internacian respondkuponon).
Pri la enhavo de la anoncetoj kaj anoncoj ne respondecas la redakcio. Ni donas nenian rabaton pro la ripeta aperigo de la anoncetoj.

Kiu povas helpi historian esploron?
 Ni ŝatus scii kie estas la juveloj de Maria de Medici. Ĉu eble en iu muzeo en Italujo, Francujo aŭ Belgio? Bonvolu skribi al: Sonja Haksteeg, Oostmaaslaan 292, NL-3063 DC Rotterdam. Montru ke Esperanto taŭgas por internaciaj esploroj. Antaŭdankon.

Se vi planas vojaĝon al Afriko, memoru ke vi povus helpi la junan E-movadon tie. Petu konsilojn kaj adresojn de la UEA-komisiito: Hans Bakker, Kastelenstraat 231, 1082 EG Amsterdam, Nederlando. Antaŭdankon!

Du polinoj serĉas korespondantojn: Maria Telichowska (50-jara kuracistino) kaj Anna Telichowska (18-jara). La unua interesiĝas pri muziko kaj medicino, la dua pri sporto kaj kulturo. Adreso: ul. J. Korczaka 10/27, PL-35-114 Rzeszów, Pollando.

Internacia Turisma Semajno en Cannes, fine de junio 1983. Informilo ĉe: s-ro Llorens, "Les Hortensias 2", Domaine des Fleurs 121 bis, blvd. Napoléon III, F-06200 Nice, aŭ ĉe: UFE, 4 bis, rue de la Cerisaie, F-75004 Paris, Francio.

Pri literaturo kaj historio deziras korespondi 28-jara oficisto: Krzysztof Silwon, Brończany 33, PL-16-061 Juchowicz, woj. Białystok, Pollando.

S-ro Josef Zitka, medicinlaboratoria teknikisto, deziras korespondi tutmonde. Adreso: Doktorsgatan 42, S-331 00 Värnamo, Svedujo.

Mi peras daŭre la diversteman literaturon de Jehovaj Atestantoj kaj akceptas la kompensajn en tre diversaj formoj, prefere antaŭpage. Riceveble en pluraj nacilingvoj: Pentti Törmälä, Hevonselkä, SF-07170 Pornainen, Finnlando.

Per bela bildkarto bonvolu ĝojigi mian vigan 84-jaran onklon kaj liajn samhejman(in)ojn: Sinjoro Antono Plukker, Bejaardentehuis (Pliaguldomo) Amby, Achter de Hoven 25, 6225 EK Amby, Nederlando. Sinceran antaŭdankon! Sinjorino M. van Bentum.

Tri amikinoj (13, 14 kaj 15 jaroj) serĉas samaĝajn korespondantojn el ĉiuj landoj. Komuna adreso: Lenka Masaříková, Kociánov 77, CS-788 11 Lovčná N/D.1, okr. Šumperk, Ĉeĥoslovakio.

Seksa humoro. 40 ilustritaj paĝoj. Antaŭpagu entute 1 dolaron aŭ proksimum-valoran monbileton: Halina Candi, Apartado 2 333, Las Palmas, Hispanio.

Malfermu ŝparkonton! Jam pli ol 250 000 guldenojn deponis membroj de UEA en fiksdaj ŝparkontoj ĉe la Centra Oficejo. Novaj kaj renovigotaj deponoj ĝuas renton de 7%. Petu pliajn informojn de la Centra Oficejo de UEA.



16-jara lernantino, Furkhanda Afzal, kaj 14-jara lernanto, Farooq Ahmad Khan (sur la foto), deziras korespondi kaj interŝanĝi bildkartojn, poŝtmarkojn kaj bankbiletojn tutmonde: Skribu pere de la adreso: Sher Bahadur Mirza, V.P.O. Dakki, Teh. Char-sadda, NWFP, Pakistano.

Esperanto-Grupo Ismael Gomes Braga (C.P. 10-2416, BR-70000 Brasília — DF, Brazilo) interŝanĝas spiritismajn Esperanto-librojn kontraŭ aliaj eldonaĵoj.

"Monda kampanjo por pli-vastigi nian movadon." Broŝuro 64-paĝa. Aŭfrankite: 22 francaj frankoj, ĉe s-ro André Grossmann, 5 rue des Pyrénées, F-68390 Baldersheim. Poŝtkonto: 819.34 U Strasbourg.

S-ino Kalocsay: En la aĝo de 85 jaroj forpasis en Budapeŝto la vidvino de la fama E-poeto kaj lingvisto Koloman Kalocsay. Ŝiaj cindroj estis lokitaj apud la edzo en la familia kripto en Máriabesnyő. Laŭ komisiio de la heredantoj de Kalocsay, pri la K-postlasaĵo — inkluzive ĉiujn aŭtorrajtojn — ankaŭ estonte zorgos: s-ino Ada Csiszár, Zsigmond tér 1/b, H-1023 Budapest, Hungario.

Ĉe-metode instruadu ankaŭ vi, private aŭ lerneje, laŭ: *Esperanto laŭ la patrina metodo*, 320 paĝoj, GM 50,00! 50-instruhora kabareto lernigas esperante kaj germane ĉiujn demandojn kaj respondojn de la ĉiutaga konversacio! August Weide, Nordalbingerweg 65, D-2000 Hamburg 61, poŝtgironto Hamburg 150 58-209.

Pri internacia pacdevigo volas korespondi John C. Lincoln, 3320 East Weldon, Phoenix, Arizona 85018, Usono.

Kiel diri? (Lentaigne). Mimeo. 5 000 zamenhofaj esprimoj pri 67 temoj. "Vera trezoro!" 9 gld. ĉe UEA. Ne pre havinda.

Studi matene, ferii posttagmeze, jen la kursformulo de la Internacia Feria Altlernejo de Kultura Centro Esperantista, CH-2301 La Chaux-de-Fonds (Svislando). Petu informilon!

Kvinjara trankvilo garantiata! Silikon kapsulo facile enplantebla, sen flankaj efikoj, nuligas nesterile nedeziratan seksardon de hundino aŭ katino; forigas virbestan voluptemon. Informu animalan pezon. Enkoverte alsendos kontraŭ 25 usonaj dolaroj aŭ egalvaloro: doktoro med., veterinaro Teodoro Vaske. Adreso: Rua Esperanto snº, BR-95760 Kaí, Brazilo.

68-jara filatelisto serĉas pli aĝajn korespondantojn: Elmar Taavo, Järve 48-15, SU-200013 Tallinn, Estonio, Soveta Unio.

Pri fotografio kaj sciencaj demandoj volas korespondi: s-ro Kambiz Ghadiri, No. 374 Khorshid (Reza I) St., Darvazeh, Shemran, Tehran 11546, Irano.

20-jara polino emas korespondi pri sporto kaj muziko kaj kolekti bildkartojn: Barbara Włodarczyk, Ul. Ogradowa 8, PL-24-200 Bełżyce, Pollando.

Eldonejo librejo SONORILO

L'espéranto dans l'enseignement, d-ro Pol Denoël. Ĵus aperis la dua eldono! 30p. 23cm. Informbroŝuro pri Esperanto kaj instruado. Prezo: 100 Bfr.

Initiation théorique et pratique, d-ro Pol Denoël. 96p. Ilus. 22cm. Bind. Gramatika lernolibro kun bonaj klarigoj pri gramatikaj konceptoj. Lernolibro plej taŭga por publikaj kursoj! Prezo: 180 Bfr.

Gluafiŝo: Internacia lingvo Esperanto: Ĵus aperis! Formato 16,6 x 7cm. Prezo: 25 Bfr.

Kartoj por la Nova Jaro: Serio de 4 diversaj koloraj kartoj en 5 lingvoj (kun kovertoj). Prezo: 60 Bfr.

Eldonejo-Librejo SONORILO estas peranto i.a. de: *Heroldo de Esperanto* (Bfr.520); *El popola Ĉinio* (1 jaro: Bfr.180, 2 jaroj: Bfr.300, 3 jaroj: Bfr.420); *Monato* (Bfr.960).

Librejo SONORILO vendas pli-malpli ĉion momente disponeblan en la Esperanta libromerkato! Bonvolu atenti, ke al ĉiuj netaj prezoj de libroj aldoniĝas sendokostoj: por la mendoj sub la valoro de 100 gld. – 20%, por la mendoj super 100 gld. – 10%. Niajn eldonaĵojn vi povas mendi ĉe la Libroŝerbo de UEA, ĉe via kutima libroŝerbo, aŭ rekte ĉe: Eldonejo-Librejo SONORILO, Doornstraat 22, B-2610 WILRIJK, Belgio.

DU NOVAJ ROMANOJ DE "DU" JOHANOJ:

Ĉu ni kunvenis vane?

de Johán Valano. Antverpeno: TK/Stafeto,

1982. 180p. 21cm. ISBN 90 6336 023 1. Prezo: 450 BF; ĉe la Libroŝerbo de UEA: 25,80 gld.

Ĉu ŝi mortu tra-fike?

de Johán Balano. Antverpeno: TK/Stafeto, 1982. 92p. 21cm. ISBN 90 6336 027 4. Prezo: 320 BF (18,60 gld). Mendo ĉe via kutima libroŝerbo aŭ ĉe la eldonejo: TK/Stafeto, Miksebaan 65A, B-2130 Brasschaat, Belgio. Aldonu afrankon 10%.

AVETO: Personoj, kiujn ŝokas kru-daj priskriboj pri seksaĵoj, kaj al ki-uj ne plaĉas esti tiel ŝokataj, bonvo-lu ne legi ĉi tiun verkon. Se malgraŭ la averto, ili tamen fordonos sin al la legado, ili plendu al si mem, ne al la eldonisto, al la aŭtoro aŭ al ofici-alaj instancoj.



UNUIĜO FRANCA POR ESPERANTO
de la 25a de junio ĝis la 2a de julio 1983

INTERNACIA ESPERANTO SEMAJNO

C A N N E S

ĉe la Lazura Marbordo, Francio.

Prezo ĝis la 31a de dec. 1982: 1850 FF; de la 1-a de jan. 1983: 1950 FF. Enkalkulitaj estas: 7 noktoj en dupersona ĉambro (kun privataj banĉambro kaj necesejo), matenmanĝo, tagmanĝo, vespermanĝo (de sabato vespere ĝis sabato tagmeze), 4 ekskursoj en komforta aŭtobuso (600 km), 1 ekskurso per ŝipeto.

Koresponda adreso: INTERNACIA ESPERANTO-SEMAJNO, "Les Hortensias 2", Domaine des Fleurs, 121 bis, blvd. Napoléon III, F-06200 Nice, Francio. Tel: (93) 83 08 73.

"Niaj grup-kunvenoj estas tedaj, tial mi ne plu vizitas ilin." Certe vi konas tiajn kaj similajn plendojn. Nu, vi ja ne tuj devas fondi – kiel oni faris en japana urbo Nagojo – monatan rondon AMIKARO DE MONATO, sed ankaŭ vi povas profiti el la riĉa materialo, kiun enhavas MONATO, por vigligi viajn kunvenojn. Neniam mankos temoj por preparoli, diskuti, aktiviĝi.

Se ankaŭ vi volas savi viajn grup-kunvenojn, petu varb-materialon ĉe: Eldonejo TK/Stafeto, Miksebaan 65 A, B-3130 Brasschaat, Belgio.

MONATO

internacia magazino sendependa

40 paĝoj DIN A4, riĉe ilustrita. Dek unu kajeroj plus poŝkalendaro jare. Jarabono 59,50 gmk aŭ 960 bfr. La abonon bonvolu sendi rekte al la eldonejo: TK/Stafeto p.v.b.a., Miksebaan 65A, B-2130 Brasschaat, Belgio – aŭ mendo ĉe landa peranto aŭ UEA (64,00 gld.; por Nederlando 66,56 gld.). Petu provekzempleron kontraŭ du int. respondkuponoj. (Tamen memoru, ke unu persono povas nur unufoje fari tian peton.)

Ĵus aperis ĉe 'Arion' unua disko en Esperanto. Kantisto estas Max Roy Carrouges. Tekstoj kontrolitaj de Roger Bernard. Vendoprez: 425 Bfr. Mendu via diskon rekte ĉe **Eldonejo & Librejo Sonorilo**. Ni donas kutiman rabaton al ĉiu revendisto (aliaj libroservoj kaj unuopuloj), kiu samtempe mendas minimume 5 diskojn *Esperanto kaj libereco*, kondiĉe ke ili estu ekspedotaj samtempe al la sama adreso. Al la sumo aldoniĝas kiel kutime la sendokostoj: vidu nian anoncon sur la antaŭa paĝo. Mendu tuj ĉe **Eldonejo & Librejo Sonorilo**, Doornstraat 22, B-2610 Wilrijk, Belgio, ĉe la Libroservo de UEA aŭ ĉe via kutima libroservo.

ESPERANTO kaj LIBERECO

Nova kaseto!


Unuafoje en Esperanto! La plej konataj israelaj kantoj ("Hava Nagila", "Haleluja" kaj multaj aliaj), kantitaj de profesia kantistino. 40-minuta kaseto, kun akompana ilustrita libreto (20p. 22cm). Prezo: 18,00 guldenoj. Mendu ĉe la Libroservo de UEA, aŭ rekte ĉe la eldonisto (kie la prezo inkluzivas sendokostojn): Junulara Esperanto-Ligo Israela, P.O.K. 22041, Tel Aviv 61220, Israelo.



MODERNAJ KAJ MALNOVAJ
ISRAELAJ KANTOJ EN ESPERANTO

Kontraŭmilita bildstria romano

La plej ampleksa verko en la bildstria ĝenro en Esperanto. Ĝi en streĉa maniero rakontas la hororon pri la unua atombombo en 1945. Tre flua traduko, kun lerta eltrovo de pluraj onomatopeaj esprimoj.



Nudpieda Gen (1973), Keizi Nakazawa (1929 -). Eljapanigis Yukio Izumi. Tokio: Rondo Gen, 1982. 4+284p. Bildstria romano. 21cm. Prezo: 30,00 gld. Mendebla ĉe la libroservoj de UEA, JEI kaj KLEG.

HIROSIMA-NAGASAKI Bilda Dokumento pri la Atombombado

estas aĉetebla ĉe la Libroservo de UEA. La Eldon-Komitato bedaŭras, ke la limigita kvanto, kiu restas, devas vendiĝi anstataŭ la antaŭa senpaga distribuado.

Hirosima-Nagasaki: Bilda dokumento pri la atombombado (1978). El la japana trad. diversaj. Tokio: Eldon-Komitato por Hirosima-Nagasaki, s.j. (1979). 344p. Ilus. 29cm. Bindita. Luksa eldonaĵo kun fotoj kaj pentraĵoj, iuj koloraj, kun raportoj kaj poemoj pri la du atakoj per atombombo en 1945. Prezo: 129,00 gld., plus sendokostoj kaj la kutima imposto de 4% por la nederlandaj klientoj.

Ĵam kompletigita plena verkaro de zamenhof?

Nu, preskaŭ! Aperis ĝis nun dek dikaj, luksaj volumoj. La tuto estas aĉetebla kiel kompleto por 390,00 gld. La unua volumo ("unuaj libroj por esperantistoj") ne plu aĉeteblas ekster la kompleto.



eldonejo ludovikito

Aliaj 9 haveblas unuope (po 39,00 gld). Aperis ankaŭ du "kromkajeroj" (po 33,00 gld). Mendeblaj do estas: ■ la inkunabloj de esperanto ■ ni laboru kaj esperu! ■ antaŭen al la laboro! ■ tamen la afero progresas! ■ hebreo el la geto ■ kun gradaj paŝoj eksterlanden! ■ klopodis organizi, sed vane! ■ por kaj kontraŭ reformoj! ■ mortinta, sed senmorta! ■ Kromkajeroj: ■ senlegenda biografio de L.L. zamenhof ■ korespondaĵo ludovikologia ■ Ĉio ĉe: uea, jei, kleg.